

la informilo

ISSN:
0291-
6037

INFORMBULTENO  PRI ESPERANTO

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIIO

FEDERATION CULTURELLE FRANCE-EST POUR L'ESPERANTO

MAISON DES JEUNES ET DE LA CULTURE Ph.DESFORGES

27, Rue de la République, F-54000 NANCY

PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

NOUVELLE SÉRIE

trimestriel
3ème trimestre 1991

N° 75




ABONNEMENT
un an: 45 FF

jara abono
por eksterlando:
57 FF aŭ 18 R.K^oj

ANTO - FLASH... ESPERANTO - FLASH... ESPERANTO

BERGEN: 2295 participants
de 55 pays, au 76^{ème} Congrès Universel
d'Espéranto



Ce nouveau Congrès Mondial qui a tenu ses assises du 27 juillet au 3 août dans une des plus jolies villes de Norvège a attesté, tout comme les rassemblements annuels précédents de la vitalité de l'Espéranto qui s'affirme sans contestation possible comme l'outil moderne de l'intercommunication.

160 espérantistes français constituaient en nombre la 3ème délégation. L'inauguration solennelle dans le vaste auditorium du "Grieghallen", apprécié par les meilleurs orchestres du monde, a généré des instants d'émotion intense.

Durant une semaine se sont succédé sans interruption les séances de travail, les conférences-débats animées par des universitaires de renom, des représentations théâtrales -citons entre autre une mise en scène originale de "La maison de poupée" d'Ibsen

=====

DANS CE N°, VOTRE BULLETIN D'INSCRIPTION

- A = à notre 32ème STAGE d'ESPERANTO PARLE (urgent!)
- B = au 7ème FESTIVAL CULTUREL INTERNATIONAL d'ESPERANTO
- C = au 77ème CONGRES UNIVERSEL (1992) à VIENNE!...
- D = au CONGRES 1992 de U.F.E. (à VERONE... Italie)

par une troupe d'espérantistes allemands- des spectacles folkloriques, les réunions des dizaines d'associations spécifiques -le programme officiel offrait aux congressistes la possibilité de profiter à leur gré de... 164 prestations différentes!-

Le banquet, le bal international, le concert de la chorale "sans frontières", événement unique dans les annales du chant puisque les choristes étaient originaires de plusieurs pays et avaient peaufiné leur prestation lors de quelques répétitions communes, les excursions diverses au cœur du pays des fjords... et puis le "petit congrès des enfants" (de 17 nations!) où seul l'espéranto était utilisé...

Il nous faut bien sûr mentionner l'épisode tragi-rocambolique de "l'Akademik Ioffe" bateau frété par 72 espérantistes lituaniens, considéré comme un "bateau espion" auquel on refusa l'entrée au port! Il fallut l'intervention du Ministère norvégien des Affaires Etrangères pour résoudre "la crise"...

C'est la ville de **VIENNE** qui accueillera, et ce pour la 4ème fois (1924-1936-1970-...1992) le prochain Congrès Mondial de l'**Universala Esperanto-Asocio**.

— MOTIONS ADOPTÉES PAR LE 76ÈME CONGRÈS —

Le 76ème Congrès Universel d'Espéranto qui s'est tenu du 27 juillet au 3 août 1991 à **BERGEN, Norvège**, avec 2295 participants de 55 pays,

= **a traité** au cours de plusieurs sessions, du thème "Pays Nordiques - Modèle de référence?", en mettant en particulier l'accent sur la collaboration des pays nord-européens dans le domaine des moyens de communication, de la législation, de la recherche de la culture, de l'éducation, de la protection de l'environnement et de l'économie;

= **a constaté** que la collaboration actuelle entre ces pays est basée sur un équilibre entre les forces centralisées et décentralisées qui ont une influence sur les sociétés nordiques;

- que cette collaboration ne se cantonne pas aux niveaux officiels mais incite tous les groupes spécifiques à une participation et ce dans les sphères les plus diverses de la société;

- que cette collaboration fait prendre de plus en plus conscience aux citoyens de leur patrimoine culturel commun;

- que la culture des pays nordiques, au cours des siècles et dans son contenu est partie intégrante de la culture européenne;

= **conclut** que cette collaboration inter-états dans les domaines importants de la vie sociale met l'accent à la fois sur les identités spécifiques des sociétés nordiques et sur leurs proches relations culturelles pouvant ainsi servir d'exemple aux autres peuples européens dans leurs efforts d'instauration d'une collaboration à l'échelle des régions;

= **déclare** qu'un tel objectif est en harmonie avec l'opinion de l'Association Universelle d'Espéranto, selon laquelle des cultures différentes doivent avoir la possibilité d'exister et de se développer parallèlement au désir de former des unions de peuples plus étendues dans les domaines de l'économie et de l'intercommunication;

= **fait remarquer** en outre que la langue universelle **Espéranto** a servi utilement à plus de 2000 personnes du monde entier en leur permettant d'échanger leurs connaissances et leurs opinions.

Le 76ème Congrès Universel d'Espéranto qui s'est tenu du 27 juillet au 3 août 1991 à **BERGEN, Norvège**,

= **constate** que pour la première fois après la seconde guerre mondiale un grand nombre d'hommes résidant dans la partie orientale de l'Europe participent à un Congrès Universel d'Espéranto à l'Ouest;

= **se réjouit** de ce fait rendu possible par l'évolution politique des dernières années;

= **met l'accent** sur le contraste existant entre, d'une part, le climat empreint d'harmonie qui a caractérisé les travaux du Congrès, élaborés par des hommes de l'Europe entière et des autres parties du monde, travaux menés en langue espéranto, et d'autre part les conflits qui entravent la coexistence des hommes en diverses régions de l'Europe;

= **attire l'attention** sur la nécessité de résoudre les conflits qui persistent, par des négociations menées dans un esprit de tolérance, de collaboration et de paix.

La 76a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1991 en **BERGEN, Norvegio**, kun 2295 partoprenantoj el 55 landoj,

= **traktis** en pluraj kunsidoj la temon "Nordio - Ĉu modelo?" kun aparta emfazo pri la kunlaboro de la nordeŭropaj landoj sur la kampo de trafiko, leĝdonado, esplorado, kulturo, edukado, junularaj interrilatoj, medio-protektado kaj ekonomio;

= **konstatis**, ke la nuntempa nordia kunlaboro baziĝas sur ekvilibro de centrigaj kaj malcentrigaj fortoj influantaj la nordiajn sociojn;

- ke tiu kunlaboro ne limiĝas al oficialaj niveloj, sed instigas ĉiujn tavolojn al partopreno en la plej diversaj sferoj de la socio;

- ke tiu kunlaboro konsciigas la nordianojn ĉiam pli pri ilia komuna kultura heredaĵo;

- ke la kulturo de la nordiaj landoj historie kaj enhave estas konsistiga parto de la eŭropa kulturo;

= **konkludas**, ke la nordia kunlaboro en ĉiuj gravaj kampoj de la socia vivo emfazas samtempe la memstarajn identecojn de la nordiaj socioj kaj iliajn proksimajn kulturajn rilatojn kaj tiel povas doni modelon al aliaj eŭropaj popoloj en iliaj klopodoj pri regiona kunlaboro;

= **deklaras**, ke tia celado harmonias kun la opinio de **Universala Esperanto-Asocio**, ke malsamaj kulturoj devas havi la eblon pluekzisti kaj disvolviĝi paralele al la tendenco formi pli vastan unuiĝojn de la popoloj en ekonomio kaj interkomunikado;

- kaj krome **atentigas**, ke la internacia lingvo **Esperanto** utile servis al pli ol 2000 homoj el la tuta mondo por la interŝanĝo de scioj kaj opinioj.


La 76a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1991 en **BERGEN, Norvegio**, kun 2295 partoprenantoj el 55 landoj,

= **konstatas**, ke por la unua fojo post la Dua Mondmilito en okcidenta Universala Kongreso de Esperanto partoprenas granda nombro de homoj el la orienta parto de Eŭropo;

= **ĝojas** pro tiu ĉi fakto, kiun ebligis la politika evoluo de la lastaj jaroj;

= **emfazas** la kontraston inter la harmonia etoso kiu karakterizis la kongresajn laborojn, faritajn de homoj el tuta Eŭropo kaj aliaj partoj de la mondo en la internacia lingvo **Esperanto**, kaj la konfliktoj, kiuj malhelpas la homan kunvivadon en diversaj regionoj de Eŭropo;

= **atentigas** pri la neceso solvi la daŭrantajn konfliktojn per interparoloj en spirito de toleremo, kunlaboro kaj paco.



ESPERANTO-FRANCE

Supplément à "Franca Esperantisto"

LORRAINE 91: Les 400 000 visiteurs de la biennale mondiale de l'aérostation ont pu s'informer sur la langue internationale au stand tenu par les responsables de la Fédération des centres culturels d'espéranto de l'Est de la France. Ballonville a eu aussi ses ballons "Espéranto".

DEUX LETTRES DE ZAMENHOF à l'un des pionniers de l'Espéranto en Hongrie, Gabor Balint, ont été vendues aux enchères à Bergen pour la somme de 4500 couronnes norvégiennes chacune (environ 4200 FF).

L'ESPÉRANTO EN NOUVELLE-CALÉDONIE: Suite à différentes informations dans les médias locaux, Bruno et Maryvonne Robineau viennent d'ouvrir un cours d'espéranto à Nouméa.

UNE PRESIDENTE élue à la tête de l'Organisation Mondiale de la Jeunesse Espérantiste lors de son dernier congrès à Karlskoga (Suède): Saskia Idzerda, néerlandaise, est entourée d'une nouvelle équipe: Andy Künzli (Suisse) et Sabira Ståhlberg (Finlande), sont vice-présidents, Yves Bellefeuille (Canada) est secrétaire général.

RENCONTRES ET CONGRES: les espérantophones ont participé à diverses rencontres spécialisées: les enseignants à Voss (Norvège), les amis de la nature à Waasmunster (Pays-Bas), les médecins à Kaunas (Lithuanie), les chrétiens à Jonköping (Suède), SAT (anationalistes) à Ottignies (Belgique).

L'ART DE TRADUIRE en Espéranto de A jusqu'à Z, la littérature espérantophone, tel est le programme proposé par le centre culturel de Bouresse, au coeur du Poitou.

L'UNESCO ET NOUS: A Bergen et à Karlskoga, Mark Fettes, rédacteur de la revue "Espéranto", a présenté l'Unesco, les clubs Unesco et leurs activités. A Bergen une nouvelle association a été fondée, "Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo", association espérantiste pour l'Unesco, en présence de la représentante norvégienne de la Commission pour l'Unesco Ida Blom.

CHANK SOOK WAI vient de Malaisie. Elle fera connaissance avec les activités de UEA à Rotterdam, puis fera une tournée de conférences organisée par Esperanto-France en décembre.

DEUX NOUVELLES ETOILES de la culture musicale en espéranto, Jomart et Natacha, participeront au Festival Culturel International en Espéranto (Paris, 9-11 novembre 1991). Venus du Kazakhstan, ils interprètent les chansons qu'ils ont écrites eux-mêmes.

L'ACADEMIE INTERNATIONALE DES SCIENCES tient sa dixième session universitaire à San Marino du 31 août au 9 septembre. Les différents départements (cybernétique, sciences humaines, mathématique, philosophie, sciences de la nature, sciences de l'environnement) utilisent comme langues de travail le français, l'anglais, l'italien, l'allemand et la langue internationale.

UNE NOUVELLE EQUIPE dirige la Ligue Internationale des Enseignants Espérantistes: équipe véritablement internationale, dont le président, Stefan MacGill, est néo-zélandais et vit en Hongrie, le vice-président Ronald Glossop, vient des Etats-Unis la secrétaire, Maria BeloŠević, de Croatie. Les autres membres viennent de Chine, de Suède, de Hongrie et de Corée. La secrétaire de la commission des examens est française: il s'agit de Marie Hunninck, de Carpentras.

HABERE-POCHE (Haute-Savoie): Avec, comme toujours, un grand succès, la semaine internationale organisée par le groupe d'Espéranto de Montpellier vient de se dérouler au centre "Joie de Vivre" à Habère-Poche. Les participants ont suivi des cours de plusieurs niveaux le matin. Le très beau temps a permis de faire diverses excursions l'après-midi. Un riche programme culturel a permis de se familiariser avec différentes facettes de la culture espérantophone.

LES RENCONTRES EN CHIFFRES: A Turin a eu lieu du 23 au 26 août le 62e Congrès italien d'Espéranto; à Osaka s'est tenu le 24 et le 25 août le 78e congrès japonais d'Espéranto. A Zagreb était prévu le 24ème Festival International de Marionnettes pour fin août, mais en raison des circonstances politiques, nous n'avons pas pu recevoir d'informations précises.

LES FAMILLES ESPERANTOPHONES ont eu, comme tous les étés, diverses occasions pour se rencontrer. Les enfants ont en particulier pu participer au "mini-congrès" organisé parallèlement au congrès international de Bergen, pour ceux qui dès leur plus jeune âge ont appris dans leur famille la langue internationale ou ont profité d'un apprentissage scolaire. Les différents problèmes soulevés par une éducation multilingue sont abordés dans un bulletin de liaison dont le 13ème numéro vient de paraître, bulletin où les familles où l'on pratique l'espéranto à la maison font part de leur expérience.

UNE OASIS d' ESPERANTO EN CALIFORNIE: J. Tilman Williams vient de donner un terrain de 8 hectares, pour la réalisation d'une "oasis d'Espéranto", dans le désert californien. Il s'agit de construire un centre culturel, dans le respect de l'environnement. Ce centre futuriste devrait être un modèle pour les relations humaines et pour les relations de l'homme avec son milieu. Architectes et experts en construction, vos idées seront les bienvenues à Oazo de Esperanto, P. O. Box 1538, Garden Grove, CA 92642 Etats-Unis,



=====
Kebekia Esperantista Junulara Organizo
 Organisation de la jeunesse espérantiste du Québec
 6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, Québec H2G 2R8 |tel| 1 (514) 272-0151

Ce sont nos amis canadiens qui ont la charge d'organiser le 48ème "I.J.K." (sigle explicité ci-dessous) qui se déroulera début août à MONTREAL. Les conditions de séjour extrêmement avantageuses et l'exotisme particulièrement attractif de la ville ne vont pas manquer de motiver de nombreux jeunes européens espérantophones qui (re)découvriront le "Nouveau Monde" d'une façon originale.

C'est la petite cité suédoise de Karlskoga qui avait accueilli cette année à la fin juillet le 47ème Congrès. On en lira le compte-rendu (en espéranto...) dans ce même bulletin.

48^a Internacia
 Junulara
 Kongreso
 Montréal



48^e Congrès mondial
 de la jeunesse
 espérantiste
 1992.08.02-09

Claude GACON, LAUREAT 1991 DU PRIX DE LA FONDATION "FAME"

La fondation internationale **FAME** pour la promotion de tous les outils susceptibles d'améliorer les relations entre les hommes vient d'attribuer un prix de 10 000 DM à **Claude GACOND**, Directeur du Centre Culturel Espérantiste de **La CHAUX-de-FONDS** (Suisse) pour les efforts qu'il poursuit depuis des décennies à la tête du K.C.E., de la Bibliothèque et du Centre de Documentation et de Recherche des Langues Internationales. Cette amicale cérémonie s'est déroulée à AALEN (D).

Tous les espérantistes qui ont eu le privilège de connaître Claude (et son épouse) et d'avoir fréquenté le K.C.E. lors de stages internationaux de haut-niveau, organisés de main de maître par le susdit, se réjouiront sans réserve de cette distinction amplement méritée.

La remise officielle du prix de la fondation a eu lieu le 30 juin dernier, dans un salon de la "Torhaus" qui est aussi le siège la Bibliothèque Allemande d'Espéranto, des mains du représentant de la FAME, Alois MEINERS, devant un parterre de 120 invités. Prisent tour à tour la parole le Maire de AALEN, le Député et le Vice-Président du Landtag, le Consul de Suisse, chaque intervenant soulignant à sa façon le dévouement permanent et le dynamisme motivant du récipiendaire et parallèlement la valeur incontestable de la Langue Internationale. Après Chevrolet et Le Corbusier, Claude Gacond est dans sa spécialité la 3ème personnalité qui honore, au-delà des frontières, la cité de La Chaux-de-Fonds.

* * * *

PASPORTA SERVO

Saluons la nouvelle édition de cette brochure du service "Voyages sans frontières" qui propose l'hébergement d'espérantophones chez des espérantophones dans 59 pays, de l'Algérie au Zaïre... "en passant par la Lorraine!". On peut se la procurer à l'adresse suivante: **J.E.F.O., 4bis Rue de la Cerisaie, 75004 PARIS**

TENDARAJ TAGOJ

Edité à Budapest, un nouveau manuel d'espéranto, **entièrement** en espéranto, spécialement destiné aux scolaires (10-14 ans). L'auteur, Stefan Mac Gill, vice-président de la Ligue Internationale des Enseignants Espérantophones, est bien connu pour son sens de la pédagogie.

L'ESPERANTO A SON "PIN'S"!

Edité par le Groupe d'Action pour l'Espéranto (St-Yrieix), il se présente sous la forme circulaire, fond or, avec un triangle blanc contenant en vert, le mot ESPERANTO et l'étoile. La mention "la langue internationale" est de couleur fuchsia.

LES CHAMBRES DE COMMERCE ET L'ESPERANTO

Dans un tryptique informatif (1990) intitulé "Chiffres clés de la formation langues" la **Chambre Régionale** de Commerce et d'Industrie de Lorraine (NANCY) met l'accent sur le nombre de stagiaires (4651) et sur celui des heures dédiées aux langues (229 830 heures-sagiaires) en mentionnant l'Espéranto dans les 10 langues offertes par les services. On sait que la langue internationale figure, pour la 3ème année consécutive, au programme de "IFV 55" -Institut des Forces de Vente- de la CCI de **BAR-le-DUC** dont le Directeur, François-Xavier GILBERT, est membre du Bureau de **Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo** auprès de I. GETHER (H), Daniel KÖNIG (D), R. ROTSAERT (B), S. YAMASAKI (J) et F.J. BRAUN (G-B).

La CCI des Hautes-Alpes met par ailleurs à la disposition du club local d'E° les grandes baies de l'établissement situé dans la principale artère de la ville et ce durant la campagne annuelle d'information du club (octobre).

UN IMPORTANT OUTIL DE PROPAGANDE

La langue ESPERANTO est-elle un gadget réservé à quelques illuminés de notre Pays? C'est là souvent la question sous-jacente à un certain nombre de remarques narquoises. Vous pouvez répondre facilement et montrer le caractère universel de son enseignement grâce au recueil établi par notre ami belge **Germain PIRLOT**:

"OFICIALA SITUACIO DE LA ESPERANTO-INSTRUADO EN LA MONDO"

8a ĝisdatita eldono - junio 1990

En 24 pages, vous sont données des informations détaillées et sérieuses sur l'enseignement **officiel** de l'espéranto, dans les **universités et instituts** de plus de 20 pays. Le point est fait sur la situation légale appliquée face à l'enseignement de la langue internationale dans 34 pays. Il s'agit là d'une mine de renseignements que tout espérantophone averti se doit de posséder.

Vous pouvez l'obtenir **gratuitement**, dans la limite des stocks bien sûr, en le demandant à l'adresse suivante:

F.-X. GILBERT, "Vert Coteau", F-55000 LONGEVILLE-en-BARROIS

IMPORTANT! Stages mensuels pour débutants à NANCY

Ils intéressent bien sûr toute la région de l'Est. Ils sont prévus à partir du 12 octobre, le 2ème samedi de chaque mois, de 10h à 17h avec pause à midi.

Ils n'auront lieu que si **12 personnes au minimum** sont inscrites **avant le 5 octobre**. Donc incitez vos amis ne pouvant venir aux cours du soir, ou hésitant à apprendre par correspondance, à fréquenter ces stages. On peut jumeler stage, cours du soir... et cours par correspondance!

Possibilité d'hôtel et repas à prix modérés à proximité.

J.-P. COLNOT

NEKROLOGO

Fine de julio mortis nia amikino **Marthe NAU**. Ŝi estis kremaciita la 24an de julio. La malĝojiga novaĵo trafis nin pere de esperantistino en Metz. Ni ĉiam memoros la aktivan samideaninon, kiu plurfoje organizis en Montigny aŭ Moulins-lès-Metz niajn regionajn staĝojn, dum jaroj funkciigis Esperanto-grupon (GEMME) en Montigny kaj plej efike aperigis en "Le Républicain Lorrain" niajn komunikojn.

La komitato

Noto de la redaktoro: al Marthe NAU ni ŝuldas la solenan inaŭguron de "l'Espace Espéranto" antaŭ la granda halo "Europa", far la urbestro de Montigny, en novembro 1987.

SAMIDEANOJ RAPORTAS...**COLMAR**

15 gesamideanoj kunvenis en la vilago STOSSWIHR, en la hejmo de Edmond LUDWIG, por komuna adiaŭa vespermanĝo. Honorgasto estis **Nevenka IMBERT**, kiu instruintis la serbo-kroatan lingvon al jugoslav-devenaj infanoj loĝantaj en Colmar, Altkirch, kaj Delles. Krome, dum 4 jaroj, ŝi prezentis la pupojn de sia pupteatro plejofte antaŭ infanpubliko sed ankaŭ okaze de kongresoj kaj kunvenoj, ĉi-foje en esperanto.

Kompreneble la lingvo de tiu vespero estis esperanto, despli ke ĉeestis samideanoj el Svedio kaj Polio.

Ni ne forgesu menci, ke Nevenka sukcesis persvadi Sinjorinon LUTZVILLER iniciati E°-kurson en la Asocio **COLMAR-Accueil**.

Agrabla etoso regis en Stosswihr, sed vere ĝoja la kunveno ne sukcesis esti, pro tio ke malbonaj novaĵoj tiam alvenis el Jugoslavio. Jes ja, por esperantistoj, inter aliaj eventoj ofte ne estas simplaj novaĵeroj ĉe la televido!...

Edmond LUDWIG

BAR-le-DUC

La unua klubkunveno de la lernjaro okazis la 11an de septembro. Ĉeestis 9 personoj. Estis ellaborita la kalendaro de la venontaj kunvenoj: la 2an merkredon de ĉiu monato. Ĉiuj klubanoj estos invitataj partopreni la Ĝeneralan Asembleon, la 9an de oktobro. Oni ankaŭ decidis okazigi specialan inform-vesperon por la publiko, mardon la 1an de oktobro en salono de la urbdomo. Ĝi anticipos malfermon de elementa E°-kurso, kiu komenciĝos la 16an de la sama monato en la klubejo.

F.-X. GILBERT raportis entuziasme pri la Universala Kongreso de BERGEN (Norvegio) kaj P. DENIS pri la "aerfesto Lorraine 91", laŭ abunda dokumentaro sendita de J.-P. COLNOT, kiu ĉefdeĵoris tie dum la tuta evento.

Kvaropo preparas aktive la 3an aŭtomobil-ralion, al kiu jam aliĝis 20 personoj.

NANCY Perkorespondaj kursoj

En la tuta lernjaro mi dissendis al la regiona gazetaro 45 komunikojn. Mi povis kontroli la aperon de nur 22. Mi registris 107 informpetojn, sed nur 75 venis el la gazetaro. Ni finis la lernjaron kun 22 gelernantoj (dum la 2 antaŭaj jaroj respektive 46 kaj 32). Ŝajne la nombro de la lernantoj duobliĝis en la vesperaj kursoj en Nancy sed malpliĝis en la p.k°.

Do, el tiuj 22, 2 finlernis "M11", kiel anoncote en la lasta "Informilo". Sed ĝis nun ili ne aliĝis al "M12" por daŭrigi! El la 32 de la antaŭa jaro, nun la 8a finlernis "M11": Sr° DREYFUS-MILLER en Mulhouse, gvidita de Sr° A. Grossmann. Gratulon!

Ili finiĝis la 19an de junio. Malgraŭ la feriojn ni okazigis 2 kunvenojn la 17an kaj 24an de julio por prepari nian partoprenon en la aerfesto "Lorraine 91". Ĉeestis deko da personoj. La nun prokimiĝanta lernjaro komenciĝos la merkredon 11an de septembro je la 19a, per ĝenerala kunveno. Ĉirkaŭ 120 cirkuleroj estis dissenditaj meze de aŭgusto al gelernintoj aŭ gelernantoj, aŭ al iamaj, aŭ al aktualaj interesatoj en Nancy kaj cirkaŭurbo. Ek de la 18a de septembro povos funkcii 2a grado kaj 3a grado (respektive kaj provizore merkrede je la 19a kaj 17a30).

La kurso por komencantoj ekfunkcios nur ekde la 9a de oktobro, ĉar ni atendas la malfermon de la Universitato. Ni anoncos kurson je la 19a horo. Se venos tro da homoj ekfunkcios 2 kursoj. Laŭ la deziro de la plej multaj, ni provos aranĝi ilin, ĉu la merkredon inter la 17a30 kaj la 22a, ĉu jaŭde ekde la 18a, ĉu vendrede post la 20a, laŭ la eblecoj de la Junuldomo. Tiam okazos interkonsento kun la amatoroj de la 2a kaj 3a grado por uzi la aliajn eblecojn de horaro, ĉar ni devas kalkuli kun disponebleco de la homoj kaj de la kurso-salonoj.

mini-staĝoj _____

Ili finiĝis la 8an de junio per ekzameno por ĉiuj gelernantoj de staĝo kaj vespera kurso. La ekzameno jam funkciis la antaŭan merkredon por la homoj ne povantaj veni sabate, kaj la ceteraj gelernantoj trapasis ĝin la sabaton (kelkaj la skriban parton merkrede, la parolan sabate). 13 kandidatoj trapasis (kaj sukcesis) la "ateston pri lernado", 6 trapasis (sed nur 4 sukcesis) la "ateston pri praktika lernado".

Sukcesis la 1an ekzamenon (laŭ alfabeto ordo): Laurence CHASSAIN (Vandoeuvre), François FISCHER, Lucie FISCHER (Laxou), Monique FRANCOIS (Nancy), Eliane FRICOT (Cirey-sur-Vezouze), Catherine GALLEGRO (Hettange-Grande), Marie-Lorraine GERMAIN (Nancy), Jacques HERLE (57 Mainvillers), Jacqueline SCHMITT (Luksemburgio), Eliane SLAVIERO (Richardménil), Madeleine TALLEMANT (Thionville), Jacqueline THOMAS (Laxou), Jean-Marie VOEGELE (Villers).

Bedaŭrinde FEI (Franca Esperanto-Instituto) ne plu donas "citojn" por la 1a ekzameno, ĉar pluraj taskoj estis bonegaj: pli ol 70 poentoj el 100, eĉ 90-92/100!

Sukcesis la 2an ekzamenon: Catherine GALLEGRO (cito "Bone"), Guy GEOFFROY (Frouard, cito "sufiĉe bone"), Jacqueline SCHMITT (cito "tre bone"), Madeleine TALLEMANT (cito "sufiĉe bone").

**** plus rapide... plus efficace ...



NOTRE NOUVEAU COURS D'ESPERANTO PAR CORRESPONDANCE



- ★ un matériel MODERNE
- ★ une technique EPROUVEE
- ★ un réseau d'animateurs COMPETENTS
- ★ un savoir IMMEDIATEMENT opérationnel

C'EST LE COURS QUATRE ÉTOILES!

adresse permanente

M.J.C. Ph. Desforges
section espéranto

27, Rue de la République
F-54000 NANCY

NOVA KOTIZO DE LA PERKORESPONDA KURSO

Niaj inform-helpantoj kaj kunlaborantoj de tiu servo bonvolu noti, ke pro plialtiĝo de la material-kosto kaj de la poŝtaj tarifoj, la kotizo plialtiĝis je 5F.

Ek de nun: kotizo kun la libro kaj la laborslipoj: **200F...** (+ la kasedo: 55F): **255F**

PRI LA LIBRO "AVENTUROJ DE KAJĈJO"...

Multaj legantoj de nia bulteno favore reagis al la eldono de tiu libreto far la GEM (Groupe des Espérantistes Meusiens).

Fakte, spite al la modesteco de iu moza (meusien) aktiva samideano, ŝajnas necese "rivelii" la naskiĝon de tiu evento.

Maria SITNIK (Pollando) tradukis siatempe, laŭ sia propra stilo (kelkaj "grumblantoj" preferus, ke esperanto estu kaj restu kvazaŭ "telefona" lingvo, kaj plie, nepre submetita definitive al la "nova testamentaro", kies sanktaj, netuŝeblaj "libroj" estas PIV kaj PAG...) rakonton, kiun verkis unue M. KOWNACKA pollingve.

Okazis, ke la aludita samideano -lia tuta familio!- amikiĝis kun Maria, kaj ke li investis egan sumon por presigi kaj diskonigi tiun tradukaĵon tra la tutmonda esperantistaro, kaj sekve, paralele "helpi" certagrade al Maria...

Eĉ se la lingvo ne estas "ortodoksa", laŭ la "sanktaj reguloj" de la ĉi-supre menciitaj libroj, eĉ se la desegnaĵojn ne prizorgis profesiulo de bild-strioj, ni opiniis, ke la iniciato de nia samideano meritis esti grandskale subtenata.

Ni esperas, ke niaj legantoj daŭre alportos sian "brikon", por ke rapide elĉerpiĝu la stoko de la libretoj!


8 *Lorraine* TUTMONDA AERFESTO

"LORRAINE 91"

la Biennale Mondiale de l'Aérostation

1000 montgolfières

sur le nouvel Aéroport Metz-Nancy-Lorraine.



TO... PRESENCE DE L'ESPERANTO... PRESENCE DE L'ESPERANTO... PRES

La festo do okazis de la 26a de julio ĝis la 4a de aŭgusto sur la nova regiona aerodromo de Loreno (inter METZ kaj NANCY, sed pli proksime de Metz).

La prezento de ekspozicio en tia aranĝo ne estas tiel facila, kiel ĝis nun spertite aliloke. Fakte la tuta aranĝo okazis sur herbejoj (nur la "oficialuloj" rajtis treti la asfaltitajn aviadilajn "...dromojn"). La diversaj ekspozicioj, ĝenerale komercaj, okazis en tendoj, pli malpli kiomfortaj, sur la herbejo (aŭ pli ĝuste "eks-herbejo"). Ĉar la aerodromo mem ne estis tute finkonstruita (ĝia oficiala inaŭguro okazos nur oktobre), estas ĉie multaj "laboroj", teramasoj, konstruejoj, ktp. La unuajn tagojn, fulmotondris pluvus..., eĉ pluvegis! La relative multaj piedirantoj, kaj ĉefe la aŭtomobiloj kaj kamionoj alportantaj materialon, kaŭzis koton. Ĝis la sabato 27/7 tagmeze ni promenis en koto ĝis la maleoloj!... En nia tendo, la grundo estis malseka kaj ni devis loki la kartonojn kun nia materialo (flugfolioj, afiŝoj, libroj, kasedoj...) sur seĝojn por eviti la malsekecon.

Poste la suno revenis, kaj estis ofte eĉ varmege. Ekde la dimanĉo 28/7 kaj ĉefe la lundon blovis terura vento el oriento. Ni estis invititaj partopreni per ekspozicio, ĉar oni konsideris nin kiel "kunlaborantojn" de la organizantoj, ĉar ni tradukis tekstojn en Esperanton, kaj deĵoris kiel tradukisto nia samideano Jacques FARJON de la GATINERIE. Ni ne pagis la tendon (la komercistoj pagis, do ni estis traktataj kiel "malriĉaj parencoj"). Nia tendo ne estis tute fermebla, ĝi larĝe malfermiĝis orienten. Tiu situacio estis relative favora, kiam pluvus (el Okcidento!) sed ne plu... kiam ventegis el Oriento! Niaj afiŝoj disŝiriĝis, la ekspozici-paneloj foje falis, polvo invadis ĉiujn niajn paperojn... Malgraŭ pluraj plendaj protestoj, ni ne povis disponi pri pli favora tendo. Ĝi estis krome malgranda. Principe la publiko povis ĉirkaŭi la ekspozicion, kiun ni starigis sur 3 tablojn disponitajn kiel , sed fakte malmultaj tion faris.

Mi aldonu, ke kiam ni alvenis la lundon 29/7, laboristoj plifortigis la ŝnurojn por teni la tendojn ĉar pro la ventego ili (la tendoj!) preskaŭ forflugis!

La organizado ne estis perfekta; ĉiam mankis io, ĉiam mankis iu informo. Por la personoj dezirantaj veni trajne kaj aŭtobuse, tute mankis informoj. Tiuj donitaj de la gazetaro kaj de la fervoj-stacioj **estis kontraŭdiraj!** Esperantistino venis de Nancy al Pont-à-Mousson, trajne, la sabaton 27/7, sed ne kapablis trovi la anoncitan aŭtobuson por atingi la aerodromon! Alia, ricevinte kontraŭdirajn informojn el la diversaj stacidomoj, trafis telefone la organizantojn, kiuj "dronis"... Respondo: "Se vi ne estas kontenta, restu hejme!" (?)

La flugo de balonoj dependas ĉefe de meteorologiaj cirkonstancoj. Ĝi povas okazi nur matene (de la 6a30 ĝis la 8a proksimume) kaj vespere (post la 18a30, ofte nur post la 20a). Dum la tago, estas danĝere por flugi (pro la varmo, sed ĉefe pro la tro granda diferenco de temperaturoj inter diversaj aertavoloj).

Balonflugoj estas tekniko de antaŭ 2 jarcentoj... Ili kapablas nur supreniĝi (oni varmigas la aeron interne de la balonsako), aŭ malsupreniĝi (kiam la interna aero malvarmiĝas). La efiko de ambaŭ procedoj agas nur post 30 sekundoj. Rapidaj almoj do ne eblas, tro granda diferenco inter 2 aertavoloj povas esti mortiga. Ili ne povas flugi, se pluvas, se fulmotondras, eĉ se la vetero belas sed la vento superas 20km/hore...

La unuaj tagoj estis preskaŭ katastrofaj. Neniu flugo povis okazi vendredon (pro pluvo, fulmotondro), nek dimanĉe kaj lunde matene... pro ventego! Preskaŭ ĉiujn aliajn matenojn okazis la flugoj, laŭdire tre bele (mi aldonu, ke krom la 1an sabaton, mi-mem ne venis, ĉar mi konstatis, ke la publiko reforiris tuj post la flugo, do estis vane deĵori ĉe ekspozicio, kie estas neniu publiko!). La "belaj" flugoj okazis sabate (28) vespere (300-400 balonoj ekflugis en la daŭro de 30 minutoj!), lunde vespere (ĉirkaŭ 200 balonoj iom -tro- dise ekflugis kaj provis alproksimiĝi al masto, uzante la aerfluojn...) sed aliajn vesperojn, foje lastminute, vespere, oni ordonis neflugon pro la vento. La 3 lastajn vesperojn okazis flugoj pli malpli ampleksaj... Nur 50-60 balonoj restis la lastan tagon...

Do la aerostatoj povis flugi nur matene kaj vespere. Kion faris la publiko dum la tuta tago? Nu, la unuan semajnon, oni prezentis sur podio demonstraciojn pri ĵudo, "maĵoretinoj", koncerton de ĉas-trumpoj, konkursojn... La ĵaŭdon kaj la lastan dimanĉon, prezentis akrobataĵojn -tre belajn- diversaj aviadiloj, inter alie la fama "Patrolo de Francio". Intertempe... oni devis elekti teruran muzikaĉon, kun ĉefe anglalingvaj kantoj. Feliĉe, de tempo al tempo ni povis aŭdi... silenton! Do tiam la publiko, por ne enui, vizitis filatelan ekspozicion, aŭ la diversajn tendojn, kie estis prezentaĵaj la plej diversaj varoj: libroj, vinoj, mielo... Ĉefe furoris sandviĉoj, glaciaĵoj kaj... "pin's-oj" (aŭ por repreni terminon konsilatan en la franca: "pingletoj". Oni vere povas paroli pri "pingleto-manio"). Ĉie oni vendis, interŝanĝis pingletojn. La esperanto-insignoj ne vere allogis la amatorojn (krom tiuj, kiuj nokte ŝtelis la stokon!). Ni sukcesis vendi nur ĉirkaŭ 20. Kelkaj vendistoj, verdire, proponis tre belajn modelojn, ĉefe tiujn kun flugbalonoj.

Dume, la aerostatoj restis nevideblaj. Ili aperis nur, kiam estis donita la ordono "ekflugi". Do tiam oni ŝveligis ilin per varma aero. Ili ŝveligis iom post iom, startis, do tre bela spektaklo kiam multaj (centoj) ekflugas samtempe. Ili iom poste malproksimiĝis, alteriĝis kelkajn kilometrojn for. Kamionetoj aŭ fortaj aŭtoj kun posttreniloj rapidis por serĉi ilin, oni refaldis la balonsakojn post malsveliĝo kaj ili revenis aŭtomobile -kvazaŭ nevideblaj- ĝis la venonta flugo. Oni ne scias, ĉu fakte venis la 1000 balonoj anoncitaj, sed ili estis multnombraj. Pri la vizitantoj: 400 000, el kiuj 120 000 la dimanĉon 4/8.

Dudeko da esperantistoj deĵoris laŭvice dum la 10 tagoj por informi la publikon pri Esperanto. Fakte la publiko ofte pasis malproksime de nia tendo (ĉu pro koto, ĉu pro alportita sablo, ĉu pro la ŝnuregoj fortigantaj la tendojn!) kaj oni devis alpaŝi al la homoj por proponi flugfoliojn. Ĉu mi citu ĉiujn helpantojn, kiuj venis? Ni diru ke, laŭ ordo de "eniro sur la scenejon" partoprenis: la ĵaŭdon por instali, Jean-Marie VOEGELE (Nancy); vendrede, Henri MOUTRIER (Nancy) kaj germana familio el la regiono de... LEIPZIG (tute hazarde!); la sabaton, Marie-Lorraine GERMAIN, Jacques HERLE (Nancy), Catherine GALLEGRO (Hettange); ni havis viziton (ankaŭ hazarde) de samideanoj el Savojo, Metz... Dimanĉe venis krome Lucie kaj François FISCHER (Nancy), Bernard VIVIER (Metz), Robert LANDEREAU -prezidanto de FET (Fédération Espérantiste du Travail)- venis speciale el la pariza regiono. Alain COLLIGNON (Vandoeuvre) kaj pluraj glernantoj de la perkoresponda kurso vizitis nin. Lunde venis Monique FRANÇOIS kaj Danièle HAUSER (Nancy).

Marde kelkaj jam cititaj kaj Sr^o GOETZ (Luksemburgio) Merkrede okazis neniu programo, do ni decidis ne iri al la aerodromo (sed ŝajne venis Sr^o MULLER el Metz); jaŭde venis Robert KUENY (Mulhouse) ĝis vendrede, Madeleine kaj Catherine ROUX (Vandoeuvre), François SIMONNET (Mirecourt); vendrede Edmond LUDWIG (Stosswihr), André kaj Masako GROSSMANN (Baldersheim) ĝis dimanĉe; sabate venis kelkaj jam cititaj homoj plus Guy GEOFFROY (Frouard) kaj dimanĉe proksimume la samaj. do entute kunlaboris pli ol 20 personoj (foje ni estis 8 samtempe!).

Ni disdonis entute ĉirkaŭ 5000 prospektojn kaj rikoltis adresojn de 35 interesatoj. La reagoj de la publiko estis tre diversaj. Kelkaj -tre malmultaj- venis al ni dirante... "De tiel longe mi deziras lerni Esperanton, sed ne trovis adreson!"... Ĝenerale la publiko jam antaŭe sciis pri E^o (almenaŭ 50% ĝenerale). Sed kelkaj tagoj estis "nigraj": tiam 7 personoj el 10 eĉ ne sciis, ke temas pri lingvo! Montriĝis kelkaj kontraŭuloj. Nia federacio eldonis balonetojn por infanoj kun reklamo: "Langue Internationale 3615 Esperanto". Ĉirkaŭ 600 estis disdonitaj; oni ŝtelis 200 restas disponeblaj (por la Foiro de THAON?) ĉirkaŭ 200. Jes... "oni" ŝtelis! Tamen estis asertite, ke nokte deĵoras gardistoj kun hundoj... Ve! La dimanĉon (28/7) matene, mi tuj konstatis, ke iu(j) traserĉis en niaj kartonoj... 105 insignoj, 200 balonoj, 7 kasedoj "estis malaperintaj". Ek de tiam, ni lasis surloke nur la stokon de prospektoj, sed ne estis facile alporti al la malproksimaj aŭtomobiloj tro pezan

kartonon! oni ne rajtis lasi la veturilojn antaŭ la tendoj, sed eniri aŭtomobile ĝis malfrue vespere vespere, kiam la publiko plejparte estas for. La perdo sumas preskaŭ 1500 frankojn, kaj ŝajne neniu asekuro protektis tion.

Finfine, laŭ nia scio, ne partoprenis esperantistaj aerostatistoj: ni do ne bezonis interpreti! Sed ni laŭ pove informis pri E^o la eksterlandajn partoprenantojn, kiuj vizitis la tendojn. Antaŭe mi estis skribinta al diversaj landaj asocioj de UEA por peti alsendon de prospektoj nacilingvaj por propagandi E^on Nur la Nederlanda Asocio plej afable sendis al ni 500 prospektojn (laŭ 5 modeloj!). Nek la Brita Asocio, nek la Germana, nek la Itala, nek la Sarlanda montris intereson. La Germanojn ni povis informi nur francalingve (kiam ili komprenis!). Renée TRIOLLE -prezidanto de UFE- donis kelkajn informilojn en la angla kaj rusa, ni faris preskaŭ 100 fotokopiojn por informi Anglojn, Usonanojn (malmultnombrajn), ankaŭ Polojn, Litovojn, Rusojn...

Post 2 jaroj okazos denove "aerfestoj" sed aliloke! (Tiam la ĉi-tiea aerodromo funkcios, flugbalonoj ne plu povos veni..., ili ĝenus la aviadilojn!)

Ĉu ni partoprenos denove? La estonteco diros, ĉu nia agado estis fruktodona. La nombro de gelernantoj en niaj kursoj estos la ĉefa respondo. Ĝenerale, 3 personoj el 4, kiujn ni alparolis, loĝas en Metz aŭ ĉirkaŭaĵo. La profito devus do esti por la kursoj en Metz. Ankaŭ en Nancy ni esperas rezultojn, eĉ en tuta Francio kaj eksterlande...

Jean-Paul COLNOT

Jen la persona vidpunkto de la prezidanto de nia Federacio pri la evento...

INFORMADO AL MILOJ DA GAPANTOJ

De la 26a de julio ĝis la 4a de aŭgusto okazis sur la baldaŭ ekfunkcianta aviadejo de NANCY-METZ (Francio)renkontiĝo de pluraj centoj da flugbalonistoj el dekoj da landoj.

Dank' al Sinjoro CHAPELIER, ĵurnalisto, kunorganizanto de la evento kaj filo de esperantisto, esperanto iĝis laborlingvo dum la tuta aranĝo. Deĵoris kiel tradukisto pri esperanto kaj aliaj lingvoj Sinjoro J. FARJON DE LA GATINERIE.

Dume, en budo, laboris tuta skipo da esperantistoj, sub gvido de la senlaca ĉefdeĵoranto -kaj vicprezidanto de Orientfranca Esperanto-Federacio-, Jean-Paul COLNOT. Dank' al la ekspozicio de la Federacio kaj varbmateriale de Unuiĝo Franca por Esperanto, la multnombraj gapantoj rigardis ne nur supren, sed ankaŭ flanken al la esperanto-budo, kie deĵorantoj donacis balonetojn kun esperanto-reklamo al la infanoj, dum aliaj informis la gepatrojn.

Menciindas, ke inter la pridemanditaj gejunuloj, pluraj indikis, ke iliaj liceal profesoroj pri filozofio kaj geografio jam estis parolintaj al ili pri esperanto. Temas pri gesinjoroj DE ZILAH el METZ. Gratulon al ili.

Edmond LUDWIG

Cotisations et abonnements pour l'année 1992

Vous pouvez dès maintenant payer votre abonnement à **La Informilo** ainsi que votre cotisation fédérale pour l'année 1992, il n'est pas nécessaire d'attendre le prochain numéro de **La Informilo**. Si vous le désirez vous pouvez également vous acquitter pour 1993 et ainsi être dégagé de votre abonnement pendant 2 ans.

Voici les tarifs pour les années 1992 kaj 1993:

	1992	1993
Abonnement à La Informilo	45 FF	45 FF
Adhésion simple à la Fédération	25 FF	26 FF

Ces sommes peuvent être payées de préférence par virement CCP à:
FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO CCP 1997 72W NANCY
Ou par chèque bancaire à l'ordre de cette même fédération, mais adressé à notre trésorier:

S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM,

=====

Ĝi okazis en la Kulturdomo "Espace 110" post la printempa stago. Nia prezidanto, E. LUDWIG malfermas la kunsidon je la 14h45 antaŭ 16 ĉeestantoj kaj salutas la asembleon kaj Renée TRIOLLE, prezidanto de U.F.E.

Antaŭ pritrakti la tagordon, P. Denis rimarkigas, ke kiam okazis speciala kongreso federacia kun ĝenerala asembleo, pli da homoj ĉeestis... Ni pridiskutos tiun punkton.

TAGORDO**1 = Agadraporto de 1990** (far Robert Kueny)

P. Denis proponas, ke ni revenu al la raporto de la "administrativa" jaro, kaj ne plu de kultura jaro kiel lernjaro (de septembro al junio).

La raporto aperis en nia bulteno "La Informilo" n°73. Akceptita de la plimulto. 1 sindeteno.

2 = Financa raporto (far André Grossmann)

Aperis ankaŭ en "La Informilo". Li aldonas kelkajn komentojn, interalie: 2700F da profito ĉi-jare. Unuanime akceptita.

3 = Perkoresponda Kurso (far Jean-Paul Colnot)

8 personoj finlernis "Metodon 11" (elementa kurso), 4 atingis la finon de "Metodo 12" (duagrada). Novaj kandidatoj: 22

Ĉi-jare la reago de la publiko al informoj estis malpli alta: 10% (anstataŭ 30% last-jare). Ĉu la vintro estis tro milda? (!!?)

4 = Libro-servo (far François-Xavier Gilbert)

Konstanta stoko...

Demandoj kaj komentoj: Ĉu niaj eldonadoj ne igas tro malnovaj? Mankas facilaj presaĵoj, lagajoj. Indus komisiono por elekti novajn verkojn ĉiujare (pripensindaĵo). Difini gustan kriterion. Ĉu sendi la "dormantan" stokon (al Rumanio?) aŭ uzi ĝin kiel premion? Vendado de libroj dum staĝoj: pripensi eventualan kontrakton por dividi la profiton inter libro-servo kaj organizanta grupo.

Grava informo de R. Triolle: la nova vortaro F/E° (tre ampleksa!) aperos venontan novembron dum la "Internacia Festivalo".

5 = Elekto de la novaj komitatanoj

Leĝe finas sian mandaton laŭ la statutoj: COLNOT - LUDWIG - SCHEIDEL - C. ROUX-M. NAU

Sin reprezentas: COLNOT - LUDWIG - SCHEIDEL - C. ROUX

(Sin° Nau forlasas la komitaton pro malsano) *

Ni dankas ŝin pro sia sindonema agado en la sino de la Federacio.

Ĉar sekreta balotado ne estas petita, la 4 kandidatoj estas unuanime, per levita mano, elektitaj. 9 homoj konsistigas la novan komitaton. Ni pripensu varbadon por la venonta jaro!

6 = Elekto de la nova estraro

La ne-koncernataj membroj forlasas provizore la salonon. Ĉar forestas DEGRELLE kaj C. ROUX, la 7 ĉeestantoj elektas jene:

Prezidanto: E. LUDWIG - **Vicprezidantoj:** J.-P. COLNOT, F.-X. GILBERT - **Sekretario:** R. KUENY - **Kasisto:** A. GROSSMANN - **Helpantoj:** R. DEGRELLE, P. DENIS, C. ROUX, O. SCHEIDEL

Respondecas en la Federacio:

Redaktado de "La Informilo":

P. DENIS

Kursoj perkorespondaj:

J.-P. COLNOT

Libro-servo:

R. DEGRELLE kaj F.-X. GILBERT

Informado ĉe gazetaro:

vakanta posteno

Junularo:

"

Ekzamenoj:

"

Simplaj membroj:

C. ROUX kaj O. SCHEIDEL

7 = Venonta Staĝo de Parolata Esperanto

Ĝi estos prizorgata de Odette SCHEIDEL kaj okazos la 19/20ajn de oktobro 1991 en MERKWILLER-PECHELBRONN (67)

Estas antaŭvidataj la kursoj A (komencantoj) gvidota de E. Ludwig ("Metodo 15"), kurso B (progresantoj) gv. de C. Roux ("Metodo CSEH"), kurso C (praktikantoj) gv. J.P. Colnot, seminario D P. DENIS kaj O. SCHEIDEL esploros por malkovri prelegontojn.

8 = Venontaj staĝoj (1992)

Printempe: Organizos ĝin Madeleine ROUX, en la "Maison de l'Asnée", ĉu la 28/29ajn de ĉu la 3/4ajn de aprilo 1992. (Ĉu stago + ĝenerala asembleo? Ĉu specifa asembleo en HETTANGE-GRANDE? Decido prokrastita)

9 = Ekzamenoj

Estas rememorigite, ke ĉiuj lokaj grupoj devos organizi mem siajn proprajn sesionjn.

Grave: Ĉiuj prov-testoj devos esti petataj ĉe la nacia respondeculo de la ekzamen-sesioj:

François LO JACOMO, 21 Rue Juliette Dodu, boîte 62, F-75010 PARIS

10 = Diversaĵoj

- Ĉeestado en la "flugbalon-aerfesto" (mondskala!) sur la futura aviadilejo inter METZ kaj NANCY, de la 26a de julio ĝis la 5a de aŭgusto. J.P. Colnot respondecos pri E^o-budo kaj alvokas kunlaborantojn! Okazas diskutoj ĉirkaŭ diversaj farenaĵoj: "pin's"-oj, balonoj, ekspozicio, video-bendo, ktp

- apero de la 2a eldonaĵo far nia Federacio: temas pri "Novelaro" verkita de nia samideano CLAUDEL, kies erojn ni jam ege frandis en "La Informilo" (popularaj rakontoj el Vogezoj).

Ĝi certagrade ligiĝas al la elĉerpiĝo de la 1a eldonaĵo: "La ronkanta avo".

Fermo de la kunveno je la 17h20 —

Protokolis Roberto KUENY

Agrabia semajno en Svedio:

La 47-a IJK

raporto "ŝtelita"
el "G.E.J.-gazeto"

Sabato, la 21a de julio 1991. Alvenas buso en Karlskoga, malgranda urbo en Svedio. Eliras kelkaj esperantistoj, al ni ne konataj - ankoraŭ ne. Post iom da promenado, ni alvenas al la hejmpopolaŭtlernejo, kie okazos la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso.

En la kongresejo nur estas malmultaj personoj, ĝis nun plej multaj ne atingis Karlskoga. Post nia akcepto ni iras al "skolta domo", kie pli ol duono de la kongresanoj dormas (ĉu nur ŝajne aŭ vere? Mi neniam komprenis tion).

Vespere jam preskaŭ ĉiuj alvenis, kaj komencigas la interkona vespero. Kim kantigas nin "frata ĵako" en diversaj lingvoj, kaj poste estas nia bonvena tasko, interkonatiĝi kun la aliaj. Ĉiuj sukcesas, kaj sekve jam la unua nokto estas tre longa. Tamen ankoraŭ ĉiuj matenmanĝas je dimanĉo, je la tago, kiu estas la vera komenco de la programo.

Pri la programo oni multe povas diri: laŭ mi ĝi estis, almenaŭ tage, iomete malplena. Tamen oni povis ĉeesti tre belajn programerojn, kiel ekzemple la ekskurson al la naskiĝdomo de Alfred Nobel. Strange: la plej gravaj faktoj de la prelego, kiun ni tie aŭskultis, ŝajne rilatis al tio, kiom da fabrikoj eksplodis kaj ke dinamito ne estas danĝera. Kro-



me, ni eksciis, kial Nobel neniam okupigis pri matematiko: lia amatino (laŭdire) forkuris kun matematikisto. Tre interesa ankaŭ estis lia laboratorio, kie ni povis vidi liajn ilojn, kiuj foje aspektis iomete strange, kaj ni tre amuziĝis divenante, por kio ili servis.

Alia tuta tago estis plenigita per la nacia programo. Ĝi konsistis el vizito de la nacia muzeo. Maljunulinoj de la loka manlabora grupo montris siajn artojn. En la vespero ni rigardis popoldancojn - por vidi, kiel oni faras, kaj poste mem montri, kiel oni ne faras. Ankaŭ tiu programero estis tre interesa.

Dum la resto de la tagoj, oficiale programis kelkaj prelegoj. Mi nur povis paroli pri tiuj, kiujn mi ĉeestis, sed ili tre plaĉis al mi. Aldoniĝas la neoficialaj programeroj, tre sportemaj kaj amuzaj.

La vesperaj (aŭ la noktaj, sed en Svedio oni somere

ne vere povas paroli pri "nokto", ĉar fakte preskaŭ ne ekzistas komplete malheligo) programoj estis plenplenaj, kun escepto de la moderna teatro, kiu

estis la daŭra ripetado de certaj vortoj kiel "mal-diagonale", "anstataŭ" kaj "nedirekta". Mi ne scias, ĉu eble tio estis tro komplika por ni, sed almenaŭ la afero diskutigis nin.



Krom koncertoj de Ĵomart kaj Nataŝa, de Amplifiki kaj Persone, okazis la minimume kvarhora internacia vespero, tre bunta kaj tre amuza. Dum la talenta vespero prezentigis tre diversspecaj novaj kaj malnovaj talentoj.

Tro baldaŭ alvenis la adiaŭa tago, vendredo. Ni foriris per la sama buso, sed nun nur kun konataj vizitaĵoj, kaj vere neniu ĝojas, ke la kongreso finiĝis. Post streĉa semajno en afabla ĉirkaŭaĵo, oni nur esperas, finfine povi dormi en la trajno.

* Silke Coburger



Ĵomart kaj Nataŝa estas duopo el Sovetunio. Ĵomart ludas gitaron, verkas la kantojn kaj helpas la karakterizan voĉon de Nataŝa. Iliaj melodioj estas reprezentantoj de bonaj rusaj elegioj kaj romancoj.

Ili kantas dum la **Internacia Festivalo** en PARIZO

===== EĤOJ EL LA 76a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO =====

Kiel kutime, partopreni Universalan Kongreson estas "unika" momento en la vivo de Esperantisto! Eĉ kiam temas pri la sesa fojo, la samaj animsentoj ekpremas la koron... Sento de profunda internacia amikeco, sento de vera homara amo, sento de senrasisma gefrata interkompreno...

Ofte oni komparas la internacian lingvon kun la muziko; en **BERGENO**, urbo de la komponisto **Edvard GRIEG** (1843-1907), ĉiuj momentoj de niaj travivaĵoj plene banis en muzika etoso. Monumentoj, konstruaĵoj, statuoj, arioj... memorigas lian genion. Kompreneble la plej gravaj organizaĵoj de la Kongreso okazis en la "**Grieg-Halo**". Preskaŭ 2500 partoprenantoj kunvenis en la granda salono, kies akustiko estas mondfame konata de ĉiuj naciaj kaj internaciaj orkestroj.

Dum la tuta semajno, miksiĝis esperantaj teatraĵoj, folkloraj spektakloj, kleraj kunvenoj, fakaj prelegoj, enlandaj ekskursoj... Laŭ la oficiala programo, mi nombris 164 organizaĵojn! Oni devis elekti kun granda malfacilo, ĉar ĉio kaptis la intereson. Eble estis tro da?

Feliĉe, ĉiu "vespero" estis sen konkurenco:

- la "**nacia**", kiu tradicie prezentas la lokajn dancojn kaj kanzonojn kun bele vestitaj gelandanoj.
- la "**teatra**", kun la verkaĵo de IBSEN, "**Pup-hejmo**", prezentita de la trupo *"**Kia Koincido**". Mirindajn momentojn ni trapasis.
- la "**muzika**", laŭ klasika kaj moderna stiloj, fare de junaj internaciaj artistoj. Grandan plezuron ili donis al ni.
- la "**internacia**", kiu montras la riĉan diversecon de la artoj de la plej malsimilaj civilizacioj... kaj fine la "**internacia ĥoro**", sub la sentema gvidado de **Dimitar TERZIEV**, kreinto de tiu efemera kantogrupo.

Kaj... kaj... Necesas paroli pri la grandiozaj pejzaĝoj, intermiksiĝo de krudaj montoj kun profundaj akvoj...

(Pri tio, bonvolu legi la artikolon publikigitan en la revuo "**ESPERANTO**" en marto 91)

François-Xavier GILBERT

* Noto de la redaktoro: ni informas niajn legantojn, ke la teatro-trupo "**Kia Koincido**" (Germanio) prezentos "**La Pupo-hejmon**" en la kadro de la Internacia Festivalo de Parizo en novembro (aliĝilo en ci-tiu bulteno)

PASKA FERIADO EN PORTUGALIO



En Portugalio estiĝis nova kooperativo, kies nomo estas "**SALUTON**". Ĝi estas ne nura "Esperanto"-asocio sed celas krei agadgrupon favore al la naturo kaj al Esperanto. Tio ebligas montri al kooperativanoj la efikecon de Esperanto kiel internacia interkomprenilo. Ĝi estas alia maniero por disvatigi Esperanton sen altrudi ĝin al ties membroj. Jen kion ni povas legi:

SALUTON, turmentita de nekonformiĝo, kaj kuraĝigita de la espero, humile ŝatus daŭrigi la Zamenhofan Idealon por Boniga Mondo.

Por tio, **SALUTON** klopodas agadi pere de kvar fundamentaj faktoroj, kiuj estas:

- 1 -- La interkompreno inter la homoj, dank'al Esperanto.
- 2 -- La kunlaboro kaj solidareco, laŭ la principoj de la kooperativismo.
- 3 -- La estimo de la naturo, ĉar el ĉi-tiu dependas la sano, la bonstato, la vivad-kvalito de la homoj, kaj iliaj raviteco, poezio kaj ekstazo antaŭ la "Kreitaĵo".
- 4 -- La Kulturo, je ĝiaj diversaj aspektoj, ĉar ĝi ebligas ĉarigi, vigligi kaj stimuli la homajn agojn.

Kion ni intencas

KREI rimedojn por soci-kultura pligrandiĝo de kooperativanoj.
KRESKIGI kondiĉojn por la harmonia kunvivado, dum liberaj

tempoj de la kooperativanoj, inter ili kaj inter ili kaj la naturo, celante ilian homan perfektigon intelektan kaj korpan.

APOGI la interŝanĝadon kun simila organizaĵoj, celante interrilaton en ĉiuj kampoj, instigante al tiu celo la utiligon de la Esperanto.

Kion ni revas

AKIRI nian propran socian sidejon.

KONSTRUI nia(j)n Kultura(j)n kaj Feria(j)n domo(j)n, kie la kooperativanoj per ĝoja kaj riĉiĝanta kunvivado, povos ĝui admirinde ripozan kaj kulturetan etoson, samtempe internacian kaj familian, aŭ dum ferio aŭ laŭlonge de la tuta jaro.

DONI al ĉiuj kooperativanoj la eblecon fariĝi kunposedanto de propraĵo ĉe marbordo kaj montaro, kie li povas ripozigi, kulturiĝi kaj kunvivi kun ĝamiko elvenintaj el ĉiuj mondpartoj.

Laŭ tiuj principoj la kooperativo akiris lastjare domon en la vilaĝo Penacova kaj intertempe ĝin plej parte renovigis. Penacova troviĝas je 25 km de la fama universitata urbo Coimbra en mezo de Portugalio. Por apogi ĝian agadon kelkaj germanaj samideanoj iniciatis la unuan seminarion de la kooperativo "SALUTON", okazinta dum Pasko de la 30-a de marto ĝis la 6-a de aprilo 1991.

Venis 12 partoprenantoj el Germanio, Francio, Luksemburgio kaj Britio. Unue ni estis gastigata en la hejme de s-ro Mario Eusébio (iniciatinto de tiu kooperativo) en Cacém je 20 km de Lisbono. Lia hejmo estas malnova muelejo kun pitoreskaj internaj rondaj ĉambroj. La tuta domo estis sufiĉe granda por nin ĉiujn gastigi. Tie ni ĝuis tute agrablan kaj simpatian etoson en internacia Esperanto-rondo. Dum 2 tagoj ni ankaŭ profitis por viziti la ĉef-urbon Lisbono kun monumento de fama maristo Vasco de Gama.

Poste ni veturis aŭtobuse al Coimbra kaj al Penacova, kie ni povis viziti la akiritan domon kun pluraj ĉambroj jam pretaj kaj meblitaj. Kompreneble multo restas ankoraŭ ferenda, ĉefe pri sanitaraj instalaĵoj. La domo estas situata ĉe monto-flanko kaj ofertas belegan panoramon al la valo kun la rivero Mondego. Dum nia restado oni ankaŭ plantis arbojn apud la domo kaj ni povis konatiĝi kun portugalaj Esperantistoj. Vespere partoprenis nian kunsidon la urbestro de Penacova. Pro transdono de memoraĵoj, li ofertis al ni por la posta tago senpagan ekskurson en la ĉirkaŭaĵo. Inter la ceteraj portugalaj partoprenantoj do kooperativanoj estis kaj Esperantistoj kaj ne-Esperantistoj. En Penacova ni restadis nur du tagojn, kio estis iom mallonga por bone interkonatiĝis kaj interdiskuti pri la kooperativo kaj ties problemojn kaj celojn kun portugalaj ĉeestantoj, kiujn ni forlasis por reveturi al Coimbra kaj Cacém apud Lisbono. Tie restis ankoraŭ unu tago da turismado antaŭ ol reflugi al niaj respektivaj landoj.

El tiu restado kaj renkontiĝo stariĝis tamen kelkaj problemoj pri interkompreniĝo kun la ne-esperantistoj kiuj ja ankaŭ estas kooperativanoj. Ĝuste en tia situacio SALUTON deziras esti ne kiel iu ajn Esperanto-asocio, sed montri per praktikaj eblecoj la valoron de internacia komunikado pere de Esperanto, kaj tiun celon ĝi tre verŝajne atingis. Jen la konkludoj aperintaj en la "Saudação Informilo":

KONKLUDOJ:

- 1 -- La kialo de nia kooperativo estas en ĉi-tiu veto: ke oni povas allogi al Esperanto homojn ne interesatajn pri Zamenhofa Lingvo.
- 2 -- Ni rekonas, ke la kunigo de la rajtoj scipovi aŭ ne Esperanton, en nia kooperativo, estas ege malfacila afero.
- 3 -- Eble ni povos solvi la malfacilaĵojn, rekonante du ekmovigojn en SALUTON: unue kiu kontentiĝas pri naciaj aferoj, kaj due, kiu sin antaŭenĵetas en internaciajn agadojn kaj kunvivadon -- sed tiu-ĉi estus nekomprenebla sen la studado kaj praktikado de Esperanto.
- 4 -- Fakte, se oni ne havus sukceson koncerne tion, SALUTON estus nekomprenebla, ĉar ekzistas P.E.A. (Portugala Esperanto Asocio).
- 5 -- Tiel, kiel la Katolika Eklezio ne devigas ĉiujn kredantojn

lerni la latinan lingvon (kaj tamen la fideluloj bone helpadas pri religiaj aferoj) -- Tiamaniere ni esperas, ke eĉ la simpatiantoj "geamikoj de Esperanto" povos multe favori la Esperanto-movadon.

- 6 -- Dum niaj "unuaj labor-tagoj" ni konstatis ke tiuj, kiuj ne scipovis Esperanton, bedaŭris pro tio, kaj entuziasmiĝis lerni ĝin. Do, ili jam garantias la veton de SALUTON; pere de kooperativaj allogoj, homoj fariĝas sentemaj al Esperanto.
- 7 -- Tiamaniere, ni konkludas ke SALUTON estas sur bona vojo.
- 8 -- Tamen ĝi estas ankoraŭ seĉo, kiu ĵus ekĝermas, kaj bezonas multe da varma apogo.
- 9 -- Sed, pere de homoj kiel tiuj kiuj partoprenis niajn "unuajn labor-tagojn", certe SALUTON iras antaŭen!
- 10 -- Do, ni prizorgu ĝin!

Por iĝi kooperativano necesas pagi ununuran aliĝkotizon je 500 eskudoj (20 FF) kaj akiri minimume 3 akciojn po 500 eskudoj (20 FF) t.e. 1500 eskudoj (60 FF). La adreso estas jena: Kooperativo SALUTON, Rua do Miradouro, 12, P-2735 CACÉM, Portugalio.

Se vi tion deziras, vi povas sendi al mi la kotizojn, kaj mi perados.

A. Grossmann

=====

INTERVJUO KUN NEVENKA IMBERT

La ĉi-suba intervjuo de Nevenka IMBERT, far nia amiko A. Grossmann, iĝas korpreneme plej grave, kiam oni pensas al niaj jugoslavaj samideanoj, kiuj nuntempe suferas en sia menso kaj foje en sia korpo, en ŝiriĝata lando, kiujn multajn el ni vizitis kaj kie esperanto multfacete kaj grandskale disvastiĝis...

Nevenka IMBERT loĝas jam de kvar jaroj en Francio, kie ŝi plenumis edukan mision. Ŝi estas membro de la teatra trupo "**Kvap**" de Zagrebo. Ĉiuj partoprenantoj de la nacia kongreso de U.F.E. en **VICHY**, ankoraŭ memoras ŝian artan spektaklon de specifaj "marionetoj", lerte "skulptitaj"... Temas pri diversformaj malplenigitaj kaj sekigitaj kolokintoj, al kiuj ŝi -helpe de juna kunhelpantino- donis "animon"...

A. Grossmann: Kiu estis la celo de via restado en Francio?

Nevenka Imbert: Mia unua celo estas maksimume helpi al la Jugoslava junularo loĝanta en Francio, por ke ili povu konservi sian kulturon kaj la sci-povon de la gepatra lingvo. Por ke ili en tute dum sia tuta vivo estu ambasadoroj pri sia lando Jugoslavio. Por ke ili povu rakonti pri la lando de siaj gepatroj, ĉar ilia propra lando estas tamen Francio. Ilia integrado al la franca socio, ĉar ofte ili vivas kiel siaj gepatroj apud la franca socio. Krome mi ankaŭ helpas al iliaj gepatroj en ĉiutagaj sociaj problemoj. Por tiuj taskoj mi estas sendita de mia lando kaj pagita.

A. Grossmann: Ĉu via agado rilatas nur al la Jugoslavaj infanoj?

Nevenka Imbert: Mi ankaŭ rilatas kun francaj institutoj, kulturaj, edukejaj, kun lernejoj, akademioj, por-instruistaj lernejoj, kun la Eŭropa kultura centro, la urbo-domo de Colmar. En kulturaj centroj mi organizis stagojn, pupteatrajn spektaklojn. Mi multe ludis en Colmar por jugoslavaj kaj francaj infanoj.

A. Grossmann: Bonvolu paroli al ni pri viaj pupteatraj spektakloj.

Nevenka Imbert: Mi ĉiam finis la jugoslavajn klasojn per prezentado de pupteatraĵoj kaj mi ludigis la infanojn en la serbo-kroata. Tio estis tute motiviga, sed iuj gepatroj tion ne komprenis. Ili ne komprenis, ke necesas iom da atrakcio por motivigi la infanojn. Mia plia grava sukceso estas la fondo de 2 pupteatraj trupoj de 5 junaj lernantinoj. Ĝis nun ili prezentis jam pli ol dek spektaklojn. Fondo de La Duo "Papuŝ" kun Marie Barthélémy por povi montri jugoslavajn marionetojn al francaj infanoj. Tiujn du celojn mi bele plenumis en tiuj 4 jaroj ĉi-tie.

A. Grossmann: Kiel Esperanto helpis al vi en Francio?

Nevenka Imbert: Mi jam havis adresojn en Colmar, tial mi sciis, ke mi serĉos Esperantistojn.

A. Grossmann: Ĉu tiuj Esperantistoj ion alportis al vi?

Nevenka Imbert: Jes, ili alportis multon al mi. Mi estis kvazaŭ en la zagreba Esperanto-klubo, do mi estis kvazaŭ en familio.

A. Grossmann: Ĉu Esperanto profitis pro via ĉeesto en Colmar?

Nevenka Imbert: Mi iniciatis pli oftajn renkontigojn, kaj ni kune organizis preleg-vesperojn, kursojn ĉe Colmar-Accueil.

A. Grossmann: Ĉu vi ankaŭ prezentis viajn pupteatrajn spektaklojn al Esperanto-publiko.

Nevenka Imbert: Lucia Borčić tradukis al Esperanto la tekstojn de la teatraĵoj el la serbo-kroata. Mi prezentis ilin en Vichy por la UFE-kongreso, en Mulhouse por Zamenhof-festo kaj en Arles okaze de la kongreso de la Provenca Federacio.

A. Grossmann: Kion vi plej multe bedaŭras antaŭ via baldaŭa foriro al via lando?

Nevenka Imbert: Estas forlasi ĉiujn infanojn kaj la melodiecon de la franca lingvo. Mi ankoraŭ ne scias, kiel mi forlasos miajn nov-akiritajn amikojn, kaj mi plen-ŝveliĝas pri tio.

A. Grossmann: Krom Alzacon, kiujn regionojn vi ekkonis.

Nevenka Imbert: Mi dufoje vizitis Parizon por 2 semajnoj. Mi vizitis Mont-Saint-Michel kaj ties regionon. Miaj Esperanto-amikoj ebligis al mi viziti 4 belegajn regionojn: Provencon, la regionon de Vichy, la regionon de Liono, kie mi prelegis kaj spektaklis en Esperanto, kaj plej laste Boulogne-sur-Mer por la lasta UFE-kongreso.

A. Grossmann: Kio estas via plej kara memoro.

Nevenka Imbert: En miaj dimanĉaj matenoj miaj kvin lernantinoj (pupteatristinoj) venadis al mi por ludi, ekzerci, improvizi, ĝui. Tiuj matenoj estis vere sindonataj al niaj arto kaj kulturo kaj ĝuo de la reciproka vivo. Por rekompenco mi akompanos ilin al Parizo dum 5 tagoj da vizito.

A. Grossmann: Ĉu vi tamen sopiras reveni al via lando.

Nevenka Imbert: Jes, malgraŭ la nunaj cirkonstancoj.

A. Grossmann: Koran dankon!



pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...


 **nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...**

- 11/13ajaj de oktobro: JARKUNVENO kaj KONGRESO (Germana Esperanta Fer-
vojista Asocio + Baden-Virtemberga E°-Ligo)
Siegfried KRÜGER, Dinkelsbühler Str.12,
D-w 7100 HEILBRONN
- 19/20ajaj de oktobro: 32a STAĜO de PAROLATA ESPERANTO (Orientfranca
Kultura E°-Federacio)
Odette SCHEIDEL, 35 Grande Rue, F-67660 BETSCHDORF
- 9/10ajaj de novembro: INTERNACIA KULTURA ESPERANTO-FESTIVALO
Daniel DOYE, 169 Av. de Choisy, F-75013 PARIS
- 6/8ajaj de decembro: 38a KULTUR-SEMAJFINO DE SARLANDA E°-LIGO (SEL)
Josef DORR, Querstr.11, Dw 6607 QUIERSCHIED



ALIGILO

VIENO



77-a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
25-a julio – 1-a aŭgusto 1992
Vieno, Aŭstrio

Konstanta adreso: 77 a UK de Esperanto
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Poŝtira konto. 62 73 37 (Centralo Den Haag)
AmRo Bank, Rotterdam: konto 42 69 01 444

Kongresa numero

ĈIU ALIĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON FOLIOKOPION AŬ SAMFORMALAN PAPERON BONVOLI
TAMPI AŬ SKRIBI PRESLITRE LAUBEZONI MILU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN

FAMILIA NOMO
(por alfabeto ordigo)

VIRO/VIRINO
(por streko unu)

PERSONA NOMO

UEA-KODO

ADRESO (naŭcilingve en latinaj literoj kun poŝtkodoj)

LANDO

TEL. N-RO (kun prefikso)

PROFESIO / FAKO

ŜATOKUPO

NASKIĜDATO

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko, mi sendas ĉi tiun aliĝilon
kaj samtempe pagas laŭ la ĉi-suba specifo al:

mia landa peranto CO en Roterdamo poŝta konto de UEA en*
per poŝtmandato eŭroĉeko banka ĝiro aŭ ĉeko, aldonante 25,00 gld.
internacia poŝta ĝiro, aldonante 11,00 gld. Bv. debeti mian UEA-konton (se kredita).

* Eblas pagi al kiu ajn alilanda konto de UEA (vidu en la Jarlibro kaj en la revuo *Esperanto*).
Tamen, preferindas uzi la apartajn kongresajn kontojn menciitajn supre.

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn sur ĉi tiu aliĝilo.

DATO **SUBSKRIBO**

Por uzo de la administracio / peranto		KOTIZO (en kategorio)	
uea-membro paginta por jaro			ADOPTA KASO
konfirmo de peranto			BLINDULA KASO
konfirmo de CO			TRIAMONDA KASO
PAGO EN CO	KONFIRMO	LITERATURA KASO	
notoj		DONACO (ĝenerala kaso)	
		ADOPTAJ GEPATROJ	
		KOSTOJ (11,00/25,00 gld.)	
		ENTUTE (en guldenoj)	

Se vi aliĝas kiel kunulo, bv. ĉi tie indiki la nomon/kodon de la ĉefaliĝinto.

Se vi aliĝas kiel handicapulo, bv. ĉi tie indiki vian handicapon.

Se vi aliĝas senpage, bv. skribi ĉi tie la kialon (vidu dorsflanke).

INTERESA IDEO (ŝtelenda!... neniuj rajtoj rezervita!)

La deĵoranta skipo dum la evento "Lorraine 91" disdonis al la vizitantoj ĉirkaŭ 300 enket-slipojn (vidu ĉi-sube). 35 estis plenigitaj.

Ni opinias, ke tiu punkta inform-modo interesindas dum diversaj porpublikaj aranĝoj, al kiuj partoprenas niaj lokaj E^o-kluboj. Sufiĉas redakti la demandaron laŭbezone.

FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO

M.J.C. Philippe DESFORGES - 27, rue de la République 54000 NANCY

(Tél. Responsable : 83 27 95 55)

SONDAGE : Merci de nous accorder quelques instants en répondant aux questions suivantes :

- Avez-vous déjà entendu parler de la langue internationale Espéranto ? OUI () NON ()
- Êtes-vous intéressé(e) par :
 - 1 - des informations sur la langue internationale ()
 - 2 - un cours d'espéranto par correspondance ()
 - 3 - un stage mensuel à NANCY (2ème samedi du mois (de 10 à 17 heures) à partir du 12 Octobre 1991 ? ()
 - 4 - un cours du soir à NANCY, le mercredi à 19 Heures à partir du 9 Octobre 1991 ()
 - 5 - un cours du soir à METZ
 - 6 - un stage à METZ
 - 7 - suggestions concernant horaires et jours préférés

- M., Mme ou Mlle - NOM et PRENOM

- ADRESSE :

- N° DE TELEPHONE :

(faites une croix dans la case qui vous intéresse)

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, lau la jena grupigo:

A Ĉiuj landoj escepte de tiuj menciitaj ĉi sekve sub B.

B: Bulgario, Ĉeĥoslovakio, antaŭa ĜDR, Hungario, Jugoslavio, Rumano, Pollando, Sovetunio, Ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo), Japanio kaj Korea Respubliko, Afriko kaj Latina Ameriko

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto (vidu liston en la Unua Bulteno)

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV ATENTE RELEGI LA ĈI-SUPRAIN KLARIGOJN

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (Ĉiuj en nederlandaj gvidenoj)	ĝis 91.12.31		ekde 92.01.01		ekde 92.04.01	
	A	B	A	B	A	B
LANDOGRUPO:						
1. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	180 552 FF	90	225 690 F	112	270 928 F	135 158
2. ne individua membro de UEA	225 690 F	112	270 828 F	135	315 966 F	158
3. kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA	90	45	135	68	180	90
4. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA:	276 F 135 414 F	135 68	414 F 180 552 F	90	552 F 225 690 F	112

DIFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ) aŭ MJ-K).

Membro-Albonanto (MA aŭ MA-K) en la jaro en kiu oni pagas la kongreskotizon *Ne temas pri Aliĝitaj*

Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).

Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu je la dato 92.01.01 estis pli ol 19 kaj malpli ol 30 jara. Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo postulas akompananton, kaj kiu povas pruviti tion per kuracista aŭ simila atestilo, sendita kune kun la aliĝilo.

Senpage aliĝas:

infanoj kaj gejunuloj ĝis inkluzive 19-jaraj je la dato 92.01.01.

- nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperos en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Kongresneco ne estas transdonebla al alia persono.

Karavanaj aliĝoj: Grupo de minimume 25 personoj rajtas aliĝi kontraŭ 90% de la kotizo en kat. 1 de la koncerna aliĝperiodo, eĉ se ili ne estas individuaj membroj de UEA. Karavana aliĝo eblas nur por landogrupo A. Petu plian informon ĉe la Konstanta Adreso.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO.

Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

Kongresa Regularo (ekstrakto): "7 Kongresanoj devas fari nemon, kio kontraias la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK." Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton por la Kongresa Regularo kaj la laŭstata neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universaliajn Kongresojn.

**NEPRE SENDU VIAN ALIĜILON
KAJ KOTIZON AL LA SAMA INSTANCO.**

32a Praktika Staĝo de Parolata Esperanto



SAMEDI 19 OCTOBRE
et DIMANCHE 20
Hôtel "Etoile"
F-67250 MERKWILLER-PECHELBRONN



Notre 32ème Stage d'Espéranto Parlé aura lieu dans la jolie borgade de **MERKWILLER-PECHELBRONN (57)** qui avait déjà accueilli les participants du 29ème Stage. L'organisatrice, Odette SCHEIDEL, invite tous les "samideanojn" des pays voisins à profiter de ce 32ème stage pour découvrir une partie pittoresque de l'Alsace, entre Haguenau et Wissembourg.

Un cycle de conférences-débats, animées par **Ivo DURWAEEL**, délégué à l'information au sein de l'**Universala Esperanto-Asocio** s'ajoutera aux cours d'espéranto de 3 niveaux. Au cours de la soirée de détente nous aurons le plaisir d'applaudir le "**Kabaret-Ski-po AMUZO**" de GLIWICE!

PROGRAMME

SAMEDI, 19 octobre

... jusqu'à 14h45: accueil des participants

15h/18h30: cours de degrés différents (pauses déterminées en commun)

Cours A (d'initiation)
(accessible aux locuteurs de langue franç. ou allem.) "Metodo 10"
Animateur: **E. Ludwig**

Cours A2 ("semi-débutants")
"Méthode Internationale CSEH"
Animatrice: **C. Roux**

Cours B (pratiquants)
"Metodo 15"
Animateur: **J.-P. Colnot**

Séminaire linguistique C
"Pligrandigi nian potencialon"
Animateur: **Ivo Durwael** (UEA-estranano)

18h30: Service de librairie
19h15: Dîner en commun à "l'Etoile"
20h30: **SOIREE-DETENTE** (Kabaret "AMUZO")

DIMANCHE, 20 octobre
9h/12h: cours selon le même schéma
12h15: Déjeuner en commun

FRAIS DE PARTICIPATION

= Cotisation-adhésion: (à envoyer avec votre fichet d'inscription):

= Abonnés à "LA INFORMILO": 120,00F
- Non-abonnés: (+45FF) 165,00F
- Jeunes gens jusqu'à 18 ans: 40,00
de 18 à 25 ans: 80,00

Les deux repas du samedi soir et du dimanche à midi seront pris en commun sur place à l'Hôtel ETOILE.

DINER: 40,00F, DEJEUNER: 40,00F

PETIT DEJEUNER: 15,00 NUITEE à l'Hôtel, 1, Rue de Woerth

1 nuit: 70,00FF 2 nuits: 140,00




Veillez envoyer le fichet d'inscription ci-dessous avant la date limite du **12 octobre 1991**

Mme Odette SCHEIDEL
 35, Grande Rue
 F-67660 BETSCHDORF - tél.: 88 54 45 02

accompagné de votre cotisation d'adhésion (chèque bancaire ou postal au nom d'Odette SCHEIDEL)

Nos amis étrangers paieront sur place de préférence. les "Méthodes 10 et 15" seront à acheter sur place.

La direction de l'hôtel assurera le transport des stagiaires arrivant en gare de Sultz-s/-Forêts



=====

32ème STAGE D'ESPERANTO PARLE
F-67250 MERKWILLER-PECHELBRONN
19/20 octobre 1991

BULLETIN D'ADHESION

URGENT

(veillez cocher les cases concernées)

* (veillez rayer ce qui ne convient pas)

M. Mme NOM :
Prénom:

ADRESSE

Je réserve ___ lit(s) dans une chambre à 1* 2* lit(s)
pour la nuit de vendredi à samedi
pour la nuit de samedi à dimanche

Je réserve ___ dîner(s) (samedi soir)
___ déjeuner(s) (dimanche midi)

Je joins ma cotisation d'adhésion (120-165-80-40) *
(additionnez si plusieurs personnes)

Je prendrai part au cours A A2 B
au séminaire linguistique C

Je réserve un exemplaire de la METODO 10
METODO 15

Je désire être accueilli à la gare de Sultz

Date et signature:



**SABATON, la 19an kaj
DIMANĈON, la 20an de oktobro 1991**

**Hôtelo "Etoile"
F-67250 MERKWILLER-PECHELBRONN**

 88 80 71 80



Sub la aŭspicioj de la **Orientfranca Kultura Esperanto-Federacio okazos, denove en MERKWILLER-PECHELBRONN**, nia Praktika Staĝo de Parolata Esperanto, la 32a! La staĝanoj de la 29a bone, plezure, memoras pri tiu pitoreska vilaĝo, norde de Alzaco, inter Haguenau kaj Wissembourg.

Odette SCHEIDEL, nia senlaca organizantino, varmkore invitas ĉiujn interesatojn el apudaj aŭ foraj landoj -kaj el Francio!- partopreni al nia aŭtuna kultura kaj malstreĉiga rendezuo.

Al la 3 diversnivelaĵoj kursoj aldoniĝos elstara seminario animata de Sr^o **Ivo Durwael**, estrarano de U.E.A., kiu gvidos debaton pri interesa temo: "Pligrandigi nian potencialon".

La originalo Kabaret-Grupo el **GLIWICE** regalos nin dum la tradicia "Amika Vespero".

PROGRAMO

SABATON, 31an de marto 1990

... ĝis la 14a45: akcepto de la partoprenantoj

15a/18a30: diversnivelaĵoj kursoj
(paŭzoj laŭ komuna interkonsento)

Kurso A (komencantoj
german- aŭ franclingvaj)
"Metodo 10"

Gvidanto: **E. Ludwig**

Kurso A2: Progresigo por
komencintoj. "Metodo CSEH"

Gvidantino: **C. Roux**

Kurso B: Praktikantoj
"Metodo 15"

Gvidanto: **J.-P. Colnot**

Seminario pri "...Pligrandigi
nian potencialon" - debatoj

Gvidanto: **I. Durwael**, UEA-estrarano

18h30: Libro-servo

19h15: Komuna vespermanĝo en "l'Etoile"

20h30: Distra Vespero
kun la skipo "AMUZO"

Dimanĉon, 20an

9h/12h: Samritmaj kursoj

12h15: Komuna tagmanĝo

PARTOPRENO-KOSTOJ

= Aliĝkotizo (sendenda samtempe kun via aliĝ
slipo):

- Abonantoj al "LA INFORMILO": 120,00FF

- Ne-abonantoj: (+45FF) 165FF

- Gejunuloj ĝis 18 jaroj: 40,00

18/25 jaraĝaj: 80,00

Ni komune vespermanĝos (sabate) kaj tagman-
ĝos (dimanĉe) surloke, en la Hotelo ETOILE
VESPERMANĜO: 40,00FF TAGMANĜO: 40,00FF

MATENMANĜO: 15,00 TRANOKTADO en la Hotelo,
1, Rue de Woerth

- 1 nokto: 70,00FF 2 noktoj: 140,00

La ĈI-SUBAN ALIĜILON vi sendu nepre antaŭ
la 12an de okt.-dankon!- al:



S-in^o Odette SCHEIDEL

35, Grande Rue

F-67660 BETSCHDORF - tel.: 88 54 45 02

samtempe kun la petita aliĝ-kotizo (banko- aŭ poŝt-
ĉeko je la nomo de Odette SCHEIDEL)

Eksterlandanoj prefere pagu surloke

"Metodoj 10 kaj 15" estos aĉeteblaj surloke.

La hotelestro zorgos pri veturigo
de la staĝanoj, kiuj alvenos en la
stacidomo de SOULTZ-S/-FORETS

32a STAĜO de PAROLATA ESPERANTO
67250 MERKWILLER-PECHELBRONN(F)
19an/20an de oktobro 1991

aliĝilo

urĝa!

(bonvolu trastreki
la koncernatajn kvadratojn)

Sr^o Sin^o Familia NOMO
Persona NOMO

* (bonvolu trastreki tion, kio ne validas)

ADRESO

Mi rezervas ___ lito(j)n en unu-* du-* lita ĉambro
por la nokto de vendredo al sabato*
por la nokto de sabato al dimanĉo*

Mi partoprenos la kurson A A2 B
la seminarion C


Mi rezervas ___ vespermanĝo(j)n (sabate)
___ tagmanĝo(j)n (dimanĉe)

Mi rezervas ekzempleron de METODO 10
METODO 15

Mi antaŭpagas mian aliĝ-kotizon (120-165-80-40)
(adiciu se pluraj personoj)

Mi deziras esti veturigita de la stacidomo al la hotelo

Dato kaj subskribo:



AMIKA ALVOKO
AL ĈIUJ ESPERANTO-INSTANCOJ
KAJ SIMPLAJ ESPERANTISTOJ

Aktivuloj de la ĉi-supra Asocio engaĝis sin varbi subskribojn por publika laŭleĝa peticio adresota al la Prezidanto de la Portugala Parlamento. La teksto de la peticio estas la jena:

"Via Moŝta Prezidanto de la Respublika Parlamento,

La subskribintoj, sciantaj la gravecon de la internacia lingvo Esperanto, ĉefe kiel neŭtrala komunikilo kadre de la rilatoj ene de E.E.K. (Eŭropa Komunumo), rajtigataj peticii -laŭ § 52a de la Konstitucio kaj laŭ la leĝo 43/90 de 90.08.10- demandas, ke, laŭ ekzemplo de aliaj eŭropaj landoj, la instruado de Esperanto estu enkondukita en Portugalion, ĉe la Eduksistema Reformo pritraktata, kiel elektebla enkursa fako de la mezgrada lernado aŭ, almenaŭ, kiel prov-eksperimento"

Tiurilate, la respondeculoj de P.E°-A. tre ŝatus, ke ni apogu (kultur-centroj, E°-kluboj, unuopuloj) tiun demandon, sendante gratul- kaj apogmesaĝon al la **Prezidanto de la Portugala Parlamento** kies adreson sekvas:

Presidente da A.R.
Assembleia da República
Palácio de São Bento
P-1296 LISBOA CODEX
Portugalio

Telegrafadreso: **PARLAMENTO-LISBOA-PORTUGAL**
Telekso: **13041 AR P**
telefakso: **+351 +1 +60 77 71**

La teksto de la mesaĝo povus esti pli malpli simila al la jena (evidente, ne absolute kopiu!):

"Okaze de prezento de Peticio fare de Portugala Esperanto-Asocio favoranta la akcepton de la internacia lingvo Esperanto kiel elekteblan fakon en la mezlernejoj, (institucio aŭ nomo...), tre sukcese uzanta Esperanton en sia agado de (specifigi: instruado, brodkaso, ktp...), sciigas al Via Moŝta Ekscelenco pri nia tuta konsento kaj apogo al la propono de la peticiintoj, kaj aŭguras, ke Vi animagorde favoros ĝin".

GRAVE: Vi redaktu vian leteron prefere en **portugala, franca, angla aŭ hispana** lingvo.

Venontjare la Jara Kongreso de U.F.E. okazos en **VERONA (Italio)** en la kadro de **Eŭropa Esperanto-Kongreso**. Vi malkovros ĉi-sube kaj dorsflanke la necesajn informojn. U.F.E. antaŭvidas karavanon al la K°



EŬROPA KONGRESO DE ESPERANTO

5 - 10 junio 1992

Temo: "*La interkomunikado en Eŭropo*"

PROVIZORA PROGRAMO

- Vendredon, 5an de junio:**
Alveno de la kongresanoj. Interkona vespero.
- Sabaton, 6an de junio:**
11.00 h. Kongresa festparolado. Saluto de aŭtoritatoj. Vizito al internaj ekspozicioj. Malgranda regalo.
15.00 h. Urbovizito. Folkloraj spektakloj en *Piazza Grande* aŭ *Gran Guardia*.
20.30 h. Kunvenoj de la estraroj de landaj asocioj. Distraj programeroj.
- Dimanĉon, 7an de junio:**
09.30 h. Komenco de la kongresaj laboroj.
10.30 h. Fakaj asocioj: eŭroponivelaj kunvenoj.
14.30 h. Kunvenoj de la landaj asocioj.
18.30 h. Diservoj (neoficiala programero).
20.30 h. Teatra vespero.
- Lundon, 8an de junio:**
09.30 h. Daŭrigo de la kongresaj laboroj.
10.30 h. Kunveno de Eŭropa Esperanto-Unio.
14.30 h. Kunveno pri la kongresa temo, malfermita al ekstermovadaj instancoj.
20.30 h. Subĉiela balo en la parko, kun orkestro.
- Mardon, 9an de junio:**
10.00 h. Konkludo de la kongresaj laboroj.
14.30 h. Ekskurso al Garda-Lago.
- Merkredon, 10an de junio:**
Tuttaga ekskurso.

amika konsilio: bonvolu fotokopii ĉi-tiun paĝon antaŭ ol sendi la aliĝilon, kiu kuŝas dorsflanke! Vi konservos sekve la provizoran programon.

EUROPA ESPERANTO-KONGRESO "Verona '92"

Verona (Italio), 05-10 / 06 / 1992

ALIĜILO

BONVOLU SENDI VIAN ALIĜON

al U.F.E. KONGRESA SERVO
4 Bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS

CCP 855 35 D PARIS

FAMILIA NOMO:

ANTAUNOMO:

Adreso (naciingve):

Poŝta kodo kaj loko:

Lando (Esperante): Telefonnumero:

Aliĝkotiĝoj (landoj A):

ĝis	91.08.31	91.12.31	92.05.15	poste
	230 F	320 F	410 F	460 F

junuloj kaj familianoj rajtas je 50%a rabato

Mi pagis per al

je dato la sumon de FF

por aliĝkotiĝo (forstreku la nevalidan):

landgrupo A / B;

baza kotiĝo / junulo (*) / familiano (**)

donaco al la kongresa kaso

Sumo

(*) naskiĝdato:

(**) familiano de la kongresano:

Subskribo:

* Vendredon ĉe la fervoja stacidomo funkcios akceptado kaj aŭtobusa servo al la kongresejo.

* Sabaton posttagmeze okazos lanĉo de paraŝutistoj en la urbocentro.

* Lunde posttagmeze, dum pritrakto de la kongresa temo en ĉeesto de nemovadaj instancoj, estas antaŭvidita samtempa tradukado.

* Celoj de la ekskursoj estos Garda-Lago (ŝipe) kaj Villa Sigurtà (aŭtoĉare).

KONGRESEJO:

Centro "Monsignor Carraro", Lungadige Attiraglio 45, Verona. Telefono: 045-915423, 915877.

Ĉe la kongresejo disponeblas: 75 dulitaj ĉambroj kun necesejo; 75 dulitaj ĉambroj kun lavkuvo; kelkaj 3/4-litaj ĉambroj kun aŭ sen necesejo; 80 litoj en ĉambregoj. Entute pli ol 385 litoj. Krome la kongresejo disponas je vasta aŭtoparkejo, du futbalkampoj, salono por tablotenis, salono por televido, teatro, vasta ĝardeno por subĉiela aktiveco; funkcias ankaŭ liftoj kaj enirejoj por personoj kun korpaj handikapoj.

La kongresejo situas je 5-kilometra distanco de la fervoja stacidomo Verona Porta Nuova. Ĝi estas kunligita per aparta aŭtobuso ankaŭ kun la urbocentro.

La restado (tranoktado kaj manĝoj) principe estas antaŭvidita en la kongresejo mem. La prezo por kompleta pensiono estas por persono tage inter 250 kaj 340 FF laŭ la ĉambrokategorio; ĝi inkluzivas unu tranokton kaj tri manĝojn.

En la kongresejo funkcios bufeda kafejo.

Pri aliaj loĝdeziroj oni aparte demandu la organiza komitaton.

ALIĜKOTIZOJ

A) Por ĉiuj landoj escepte de tiuj menciitaj sub B:

ĝis 31.08.1991	230 FF
ĝis 31.12.1991	320 FF
ĝis 15.05.1992	410 FF
poste	460 FF

Por junuloj (ĝis la aĝo de 30 jaroj je la dato 01.01.92) kaj por familianoj: 50%a rabato.

B) Por loĝantoj en Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio, Rumanio, Pollando, Sovetunio, ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.): 50%a rabato sur la A-kotiĝoj.

Aranĝita kaj organizita de Eŭropa Esperanto-Unio.

Kunordiganto: Salvatore ARGENTINO.

Sidejo de la organiza komitato: vicolo Ghiaccina, 3 - 37122 Verona

9 - 10ajn de novembro 1991

7a INTERNACIA KULTURA ESPERANTO FESTIVALO

ALIĜILO

NOMO: Antaŭnomo:
Adreso: Telefono:

MENDO

(por indiki via(j)n mendo(j)n, faru krucon en la)

SPECIALA ENIRKARTO valida por la 5 spektakloj plus la literaturo forumo, normala prezo	<input type="checkbox"/>	250 FF
RABATITA PREZO (nur por la membroj de UFE / JEFO, au por eksterlandanoj membroj de UEA / TEJO)	<input type="checkbox"/>	200 FF
Nur TRI spektakloj, vialekte	<input type="checkbox"/>	150 FF
UNU spektaklo	<input type="checkbox"/>	60 FF
LITERATURA FORUMO	<input type="checkbox"/>	20 FF
KOMUNA DIMANĈA VESPERMANĈO	<input type="checkbox"/>	100 FF
POSTFESTIVALA LUNDA VIZITO	<input type="checkbox"/>	40 FF
HOTEL ĈAMBRO : nokto(j) de Vendredo al Sabato	<input type="checkbox"/>	170 FF
(por 2 personoj; de Sabato al Dimanĉo	<input type="checkbox"/>	170 FF
sama prezo se 1) de Dimanĉo al Lundo	<input type="checkbox"/>	170 FF
SPECIALA TRAJNA RABATKUPONO (20 %)	<input type="checkbox"/>	senpaga

PAGO

JE LA NOMO DE UNUIĜO FRANCA POR ESPERANTO - UFE
(Poŝtekkonto : UFE 855 35 D PARIS)

La tuton vi resendu
NEPRE ANTAŬ LA 25th de OKTOBRO,
kun aŭfrankita letero je via adreso al : =====>

DOYE Daniel
169, Avenue de CHOISY
F - 75013 PARIS
Tel. : (1) 45 83 36 25

M.J.C. 31, Boulevard Gambetta
F-92130 ISSY LES MOULINEAUX
(ĉe PARIZO)

U.F.E. INVITAS VIN

PROGRAMO

SABATON, la 9^{am} de novembro:

15.00 : . Recitalo de ĴAK LE PUIL (Francio)
kaj aliaj artistoj el diversaj kontinentoj

17.00 : . Teatro: Kia Koincido (Germanio) prezentas :
"La pupohejmo", de Ibsen

21.00 : . Koncerto de rokmuziko

DIMANĈON, la 10^{am} de novembro:

10.00 : . Literatura forumo : "Kien la poezio ?" kun J.P. Danvy kaj aliaj

14.30 : . Malnovaj tradiciaj instrumentoj (ge-Rössler, Germanio)
. Recitalo de Ĵomart kaj Nataŝa (Kazakstano)

16.30 : . Teatraĵo: "Venontjare denove kune" (Bulgario),
. Varieteoj

19.30 : . Komuna vespermanĝo

Pluraj aliaj artistoj sinproponis (el ĉinio ekz.), kaj ni esperas eĉ pli abundajn programerojn...
Definitiva programo havebla ek de la 25a de oktobro sur aŭtomata respondilo :
(1) 48 87 07 42

LOKO

M.J.C., 31 Boulevard Gambetta 92130 ISSY-LES-MOULINEAUX
(ĉe PARIZO) (Pariza metrostacio "CORENTIN CELTON", linio 12).
Tre facile atingebla de la centro de Parizo.

Bela renovigita spektaklejo. Pluraj tre taŭgaj salonoj je nia dispono kun ekspozicio de esperanta artistino, libroservo, trinkejo prizorgita de JEFO...

POSTFESTIVALA VIZITO

LUNDON, la 11^{am} de novembro:

10.00 : . Parizo laŭ la historio de Esperanto : gvidita vizito,
se minimume 10 personoj aliĝas.

9-10-11 novembre 1991
**FESTIVAL
INTERNATIONAL**



**DU THÉÂTRE
ET DE LA CHANSON
EN ESPERANTO**

EKSPozICIO "TUTA HERGE"

WELKENRAEDT (B) 8/6 = 15/9/91

=====



En la nord-orienta parto de Belgio troviĝas ĉarma urbeto Welkenraedt. Tie, dum tri monatoj ampleksa ekspozicio pri Hergé, la aŭtoro de Tinĉjo, allogas milojn da turistoj. Krome la tuta urbo estas ornamita; butikoj, magazenoj, stratoj, restoracioj montras per bildoj, afiŝoj, banderoloj, maketoj plej diversajn scenojn el la aventuroj de Tinĉjo. Ie staras gardistoj de Suno-templo, ie la raketo, per kiu Tinĉjo atingis la Lunon, aliloke la famaj Citserono kaj Tsicerono ktp, kvazaŭ fabela urbo.

La ekspozicio montras la amplekson pri la komerca sukceso de la verkoj de Hergé. Kiel skolto, Hergé faris siajn unuajn desegnaĵojn en skolta revuo rakontante la historion de skolteto al aliaj skoltetoj. Tio estigis *La aventurojn de Totor* en 1926. En 1929 li kreis Tinĉjon kvazaŭ frateton de Totor iĝinta ĵurnalisto. Tiam aperis la unua albumo *Tinĉjo en la lando de la Sovetoj* sekvata de *Tinĉjo en Kongo*. Por progresi en la ekspozicio-mem necesas transiri barelon, kiel en *La krabo kun oraj pinciloj*, opio-fumejon kiel en *La blua lotuso*, la superan etaĝon de la lun-raketo, kiel en *Oni marŝis sur la Luno*. Tie la lun-vojaĝo de Tinĉjo estas komparata kun tiu de Armstrong, kaj vera lun-ŝtono estas ekspoziciita. La 11-an de aŭgusto oni eĉ lanĉis la raketon de Tinĉjo. Ĝi altiĝis je 600 metroj.

En tiu alloga kadro la Esperanto-grupo de Welkenraedt ankaŭ propagandas pri Esperanto menciante, ke du albumoj jam estas tradukitaj kaj eldonitaj en la internacia lingvo. La grupo disdonas al interesiĝantoj faldfoliojn kun paĝo de *La Nigra Insulo*, kun kelkaj gramatikaj klarigoj donitaj en la franca, la nederlanda, la germana kaj la angla. Eblas gajni memgluaĵon per taŭga traduko de unu el la 7 frazoj en Esperanto.

Dum nia migrado tra Belgio ni havis ne nur la eblecon kaj la plezuron viziti en Welkenraedt tiun mirindan ekspozicion sed ankaŭ tie renkonti Esperantistojn el Germanio, Sovetunio kaj Belgio. Ni kune vizitis la urbon Lieĝo kaj ĝuis agrablan, simpatian kaj internacian vesperon.

A. Grossmann

MIA VIVO DE JAPANA KNABO (fino) _____

La privataj lernejoj estas konfesataj, mi do iris al budaisma lernejo. Tio signifas, ke mi devis lerni budaismon. Ĉiun matenon ni devis preĝi antaŭstatuo de Budao, kies bildo estis en ĉiu klasĉambro.

Estis Budaa statuo en la enirejo kaj ni devis saluti ĝin per kapklino, kiam ni en- aŭ eliris, kaj ĉiam estis tie iu ajn instruisto por kontroli ĉu oni vere bone kapklinis! sed Budaisma altgrada lernejo havas ankaŭ siajn avantaĝojn: budaismaj festoj, kiuj por ni estas ferioj. Tion mi tre ŝatis.

Kion mi tute ne ŝatis, estis ke ni devis ĉiam surhavi nian lernejan uniformon. Ĉar mi abomenis tion, mi ofte iris al vendejoj en "normalaj" vestaĵoj, sed ofte instruistoj kaŝis sin, por vidi ĉu la lernantoj vere surhavas sian uniformon! Oni do devis esti tre singardema... Ĉar ve!... se ili kaptis onin sen uniformo!!!

Tiuepoke longaj roboj estis modaĵ. Do kelkaj knabinoj iom plilongigis ilin, sed se iu instruisto tion rimarkis, li detranĉis al ili hararon!

Ĉiunonate iu malsimpatia instruisto venis por kontroli la longecon de nia hararo kaj la purecon kaj bonordon de niaj tekoj...

...

En ĉiu elementa, mezgrada aŭ altgrada lernejo estas kutimo en Nipono, pri kiu mi volas rakonti al vi: en ĉiu klaso oni elektas klasrepresentanton. Matene, kiam instruisto eniras, tiu klasrepresentanto ekkrias: "Kiritu!". Tio signifas "Ekstaru!"... kaj kiam la instruisto alvenas antaŭ la ni-gran tabulon la aludita lernanto krias: "Kiŭotuke!", tio estas "Rektiĝu!". sekve oni rektiĝas kiel soldato antaŭ oficiro!... Nun li krias: "Rei!"... "Salutu!" kaj oni salutas kapklinante. Poste li krias: "Ĉakuseki!" -Sidiĝu!- kaj oni residiĝas.

Kiel mi ĵus diris, por saluti ni klinas kapon, sed tion ni ankaŭ faras, kiam ni parolas kun superuloj, kaj ofte Okcidentanoj opinias, ke ni estas tre malĝentilaj, ĉar ce vi estas ja malĝentile ne rigardi tiun, kiun ni alparolas. Mi nun komencis alkutimiĝi al tio... sed mi esperas forgesi tion, kiam mi revenos al Nipono, ĉar oni tie pensos, ke mi iĝis tre malĝentila!

Mi konatiĝis kun Esperanto dum mia mezgradlerneja tempo, sed komencis vere lerni ĝin dum mia altgradlerneja. Okazis de tempo al tempo ekskursoj al aliaj urboj, kiujn mi malofte partoprenis pro malbonfarto sed foje mi iris al Kjootoo. Esperantistino atendis min ĉe la stacidomo...

Tio tre surprizis la aliajn geknabojn, sed kvankam mi interne fieris kiel virkoko, mi ŝajngis la plej naturan modestecon! Si preparis ĉion por gastigi min en sia propra hejmo... sed malfeliĉe mi ne rajtis tranokti ĉe ŝi... pro alia lernejregulo! Imagu: en Tookjoo mi eĉ ne rajtis tranokti ĉe mia propra onklo!

En la altgrada lernejo mi studis certe pli ol 15 fakojn... Japanan lingvon, japanan kaj ĉinan klasikajn literaturojn, historion, geografion, matematikon -algebron-, geometrion-, socialajn sciencojn, kalkulon per abako, etikon, komercan praktikon, librotendon, hemion, fizikon, higienon budaismon, komputadon kaj kompreneble sportojn! Juna Nipono devas nepre lerni ĵudon, ĉar li ne estus vera Niponano, ĉu vi ne opinias? Ni ankaŭ ludis basbalon... eble por imiti Usonanojn... kaj piedpilkon... Ĉu por imiti Eŭropanojn?

Por la someraj interlernejaj matĉoj, kiuj okazas en stadiono "Koosien", proksime al la granda urbo Oosaka, venas la nipona ŝtata elsend-asocio "Nippon-Hooso-Kyokai (NHK) cele dissendon de tiuj "famaj" eventoj!

Ĉiuj partoprenantoj konservas ne nur bonajn memoraĵojn pri la ludoj, ŝvitojn -kaj eble larmojn- sed ankaŭ iom da sablo el Koosien laŭ tradicia kutimo.

.../...

Mi esperas, ke mia prelego ne tro enuigis vin; se vi havos demandojn... ne hezitu: pafu!

Tsukuru HARADA

Nia rumana amiko Vasile sendis al ni du raportojn, kiun vi legos ĉi-sube.

La 9a INTERNACIA METODIKA SEMINARIO (I.M.S.)

Ĝi okazis la 7/12ajn de aprilo 1991, en la urbeto **Odorheiul Secuiesc**, Rumanio, en la konstruaĵoj de la Industria Liceo n°1. Ĝin organizis la loka E°-Grupo gvidata de profesorino **Kornelia NAGY**, malnova kaj fervora esperantistino. Partoprenis 39 diversagaj samideanoj el Rumanio Hungario kaj 2 junuloj el Hispanio kaj Korea Respubliko.

Spertaj esperantistoj el Budapeŝto -**Stefan Mac Gill**, **Zsuzsa Barcsay**, **Márta Kovács** kaj **Zsafia Barossné**- prezentis modernajn instruteknikojn kaj principojn en la lingvoinstruado, precipe por la internacia lingvo. La programo inkluzivis model-lecionojn, prezenton de modernaj lerniloj, prelegojn, diskutojn prezentitaj de ekspertoj en lingvoinstruado. Ankaŭ estis organizita bela unutaga ekskurso al la fama kuraĵloko por virinoj, **Sovata**, kun vizito en la sal-minejo en **Praido** kaj al la famaj potfaristoj en la vilaĝo **Korundo**.

La seminarion solene malfermis la urbestro **Ferenc Farenczy**, en la festa salonego de la urbdomo, per du mallongaj hungarlingva kaj rumanlingva paroladoj pri la lingvo Esperanto kaj pri la granda honoro por la urbo Odorheiul Secuiesc gastigi la 9an IMS.

Poste, en la salonoj de la urbdomo, al ĉiuj partoprenantoj oni servis kafon, oranĝsukon kaj famajn "Kürtös-Kolács". Preskaŭ du horojn, la urbestro, la senatoro **Attila Verestey** kaj la lerneja inspektoro **István Bender** interparolis kun la seminarianoj kaj ĉiuj aŭskultis el sonbendlaŭtigilo la Esperanto-himnon kaj... la voĉon de **Dr° Zamenhof**!

La seminario finiĝis per ekzameno laŭ **ILEI/UEA**-regularo. Sukcesis 24 personoj, kiuj ricevis internaciajn atestilojn (8 elementajn, 14 mezgradajn). Ankaŭ mi sukcesis kaj ricevis mezgradan atestilon...

Antaŭ la seminario, de la 2a ĝis la 7a de aprilo, Sin° **Eva Farkas-Tatar**, redaktorino de Esperanto-Radio-Budapeŝto, gvidis la lan Tutlandan Esperanto-Kurson!

Vendrede, la 12an de aprilo, post la ekzameno, grupo de plenaĝaj virinoj prezentis al ni, en la urba junulara teatro, belan programon de rumana kaj hungaraj dancoj kaj kantoj, kaj du hor-grupoj de plenaĝaj viroj kaj virinoj aŭdigis belajn hungarajn kantojn.

Ĉio finiĝis per gaja, amikeca vespermanĝo. Ĉiokaze, krom la fakto ke la partoprenantoj, hungaraj kaj rumana, eksciis multe pri la metodologio de Esperanto, naskiĝis inter ili bonaj kaj belaj amikec-ligiloj, kiuj certe fortigos la rumanan-hungaran amikecon.

Neniam mi povos forgesi la 9an IMS kaj la tre gastemajn samideanojn el O.S., kiuj, je la dis-iĝo, faris valorajn memordonacojn al ĉiuj (eĉ "sorabanon", malnova kalkulilo simila al abako, pri kies uzmodo instruitis Sin° Nagy).

Vasile ALBU

SIBIU Rumanio

SIMPOZIO "ARON COTRUS" KAJ ESPERANTO EN SIBIU (R)

"... Ĝaŭdon, la 25an de aprilo 1991, Transilvana Asocio por Rumana Literaturo kaj Kulturo de la Rumana Popolo, "Astra", en la salonego de sia biblioteko, organizis organizis simpozion dediĉata omaĝe al la rumana poeto **Aron Cotrus** (legu: Aron Kotruŝ), okaze de la 100 jaroj de lia naskiĝo kaj 30 jaroj de lia morto (1891-1961). La poeto naskiĝis en la vilaĝo **Haŝag**, distrikto Sibiu, kaj post la dua mondmilito, estis devigata vivi malproksime de sia lando, en Hispanio kaj Usono, kie li loĝasis (en Los Angeles).

Ĉi-okaze mi parolis kelkajn vortojn pri Esperanto ĉia pri poezi-verkaro de A. Cotrus, tradukita en la internacian lingvon de C. Dominte, kaj publikigita en la "Rumana Antologio", Zagreb, 1990. La loka gazeto "Tribuna" skribis jenajn liniojn pri tiu evento:

"La emerita profesoro Vasile ALBU prezentis al ni neeldonitan legaĵon, la tradukon en la lingvo Esperanto de la poezio "O, plecárile, plecárile..." (O forveturoj, forveturoj...) de Aron Cotrus, poezio, kiu apartenas al la unua antologio de rumana poezio en la lingvo Esperanto".

Vasile ALBU



? U distra angelo



KRUCVORT-ENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

HORIZONTALE

1 Politika regimo de privileĝaj klasoj. 2 Tago (r) - konsonanto - plezurdoma ĝardeno (r). 3 Bongusta fiŝo - severe riproĉi. 4 Malgrandigo de kvanto - lumĵetante. 5 Marmamulo - skribilo (r). 6 Interligilo (r) - Svedano ekzemple - muziksigno (fonetike). 7 Stelo en la konstelacio Aglo - muziksigno (f) - patriarko. 8 Onomatopeo - nordafrika herbo - dupulia levaparato (r). 9 Meza parto de ŝipo (r) - ebenpeco - konjunkcio - eligi lamenton. 10 Speco de crestiĝo - angla siglo por grava malsano. 11 Vasta kaj profunda valo - parto de vestaĵo (r). 12 Optika aparato uzata de kuracisto.


VERTIKALE 1 Moderna scienco pri interplaned-vojaĝoj. 2 Malofte - konsistanta el teksaĵo - tre konata de la publiko (inverse). 3 Ne esti certa pri ia realeco (inv) - sufikso - fosanta mamulo (r) - muziksigno (r). 4 Festoj de Saturno. 5 Japana urbo - desinfektilo (r). 6 Elokventa parolanto - juda kultestro (r). 7 Ezotera komunikilo - rivero en Sovetio. 8 Fama pentristo - kastrita taŭro (r). 9 Pasie amanta - ĉarĝa marsupialo (r kaj inv). 10 Platvermo (r) - flava floro. 11 Artefarita fibro - naiva trompeblulo (r). 12 Scienco pri popoloj kaj moroj el Oriento.

SILAB-ENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj vorteroj malkovru vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj vertikale legataj elformas proverbon.

ak ba bus dan do el em in jod ko ko la lo lu mi na nek no no op os per pi re ro ro sek sto ta to to tre umo vi vi ze

- | | | |
|----|---------------|-------------------|
| 1 | + - - + - | riverfiŝo |
| 2 | + - - + - - | furaĝplanto |
| 3 | + - - + - - - | atak-kaŝloko |
| 4 | + - - + - | kanto de Alpano |
| 5 | + - - + - - | frukto |
| 6 | + - - + - - - | pelto de didelfo |
| 7 | + - - + - - - | dolĉa likvaĵo |
| 8 | + - + - - - - | magra prestipo |
| 9 | + - - + - - - | ceda returniro |
| 10 | + - - + - - - | afabla peto |
| 11 | + - - + - | koketulo |
| 12 | + - - + - - | favore kri-saluti |
| 13 | + - - + - - | muzikintervalo |



10an de septembro: milionoj da francaj geknaboj eniras sian lernejon...

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ (74)

krucvort-enigmo: memorkapablo anagal menso gonado ina oks iru bir bk ne smeraldo akir talono alpo ov rasto erotika anakinezi tut tavolo misilo analfabeto ir nana ulemo psi ostomedolito

silab-enigmo: "Parolo estas arĝento, oron similas silento".